



Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista
 Unu n-ro : 8 FF. Unujara abono kun adresaro : 40 FF
 Rekte ĝiri al pĉk-numero : 3371 74 M BORDEAUX, profite al :
 Cercle amical esp. agenais, F 47340 Laroque Timbaut



utopio



- Lingvo internacia estas utopio.
 - Ja certe. Ni ne rifuzas la vorton, male ni plenkonscie pretendas pri ĝi.
 - Kial do ?
 - Tial ke ofte hodiaŭa utopio estas morgaŭa realo.
- Dum multaj jarcentoj, de la mita Ikaro ĝis la praktikema Montgolfiero, la konkero de la aerspaco estis utopio. De Leonardo da Vinci ĝis Ader, Wright, Santos-Dumont, flugado

per aparatoj pli pezaj ol aero estis utopio. En 1950 mi ĉe-
estis prelegon de Ananov, teoriisto pri astronautiko. Li
priskribis al ni la estontajn raketojn, la orbitajn veturil-
ojn, la kosmajn staciojn, la ir- kaj revenajn spacoŝipojn.
Ĉio tio estis ankoraŭ nur utopiaj planoj - nun efektivigitaj.
Al la demando, ĉu homoj atingos la lunon, li respondis :
eble en j. 2000, eble eĉ pli malfrue ; apenaŭ tri jardekojn
poste homoj tretis la lunan surfacon, kaj nun oni preparas
ekspedicion al Marso, al Venuso, kaj sondaparatoj sendas
al ni deproksimajn fotojn de Jupitero, de Neptuno, de
Uranuso.

En la heroa tempo de aviado, la malfeliĉa rekordulo
Geo Chavez, mortanta en Domodossola post sia (unua)
Transflugo de Alpoj, murmuris en sia deliro : "Pli alten!
Pli alten!... ĝis la steloj!..." Utopia revo... Nun, se nur ni
rigardas kiel stelojn la planedojn de nia sunsistemo, ĝi as-
pektas al ni kiel ebla, eĉ proksima realo. Daŭre, senfine,
la aŭdaco de la pioniroj antaŭenpeladas la limojn de neblo.

Per la progresado de sciencoj kaj teknikoj, pli kaj pli
rapide proksimiĝas la efektivigo de utopioj. La belaj
fabeloj de Jules Verne, kiuj sorĉis nian infanecon, ne plu
mirigas niajn nepojn, ĉar ili fariĝis ĉiutagaĵoj.

- Nu, eble, sed ni vivas en pozitiva ĥadiaŭo, ne en nebula
morgaŭo...
- Ĝuste. Por ni esperantistoj, inter ni, la utopia mondo-
lingvo estas jam nun realo. Jam nun, ni vivas en praktiko
nian belan karan utopion.

VALO

~~~~~

#### KORESPONDI DEZIRAS :

Instruisto 34-j. el Pollando, dezirante viziti Francion volus  
korespondadi kun gefrancoj Esperante aŭ france ; interes-  
iĝoj estas instruado de muziko, turismo, agrokulturo kaj  
automobilismo.

Alskribo : Krzysztof MUSIEWICZ, Glinno 178,  
PL 64-300 Nowy Tomyśl, Pollando

-----  
la venonta numero de LI aperos fine de septembro  
kun, espereble, la Adresaro 1989-90 de la abonantaro

## El la "KARAKTEROJ"

de  
LA BRUYERE

Ekstraktoj  
el la franca originalo  
elektis kaj tradukis  
Valo

1989

## Jean de La Bruyère

(pr. Labrüjer)

(1649-1696)

La Bruyère verkis siajn "**Karakterojn**" en la jaroj 1688-1696, do unu jarcenton antaŭ la franca Revolucio. Duon-jarcenton pli frue ol Volter, Ruso kaj la Enciklopedio, li kvazaŭ anoncis tiun revolucion, per kiuj la burĝoj, kapablaj kaj riĉiĝintaj, jam posedantaj ekonomian potencon, akiris per klasbatalo la politikan regadon : ili tiel venkis kaj anstataŭis la klason de la feŭdaj nobeloj kaj korteganoj, la altranguloj, kiujn li nomis "la granduloj".

Rojalisto, li, kiel preskaŭ ĉiuj samtempaj verkistoj, gloris kaj flatis la "grandan reĝon" Ludovikon la XIV-an kaj la "grandajn komisiitojn" de la ŝtato, kiel ministro Colbert ; dume li severe vipis la "grandulojn", kaj same la riĉajn burĝojn, precipe la novajn riĉulojn, kiuj penadis imiti la aristokratojn, kiel la burĝo-nobelo de Molière (Moljer).

Lia artikolo pri milito, militistoj kaj armiloj havas la saman ironian tonon kiel la rakonto de Volter en **Kandid** (la batalo inter Bulgaroj kaj Abaroj).

La tradukinto.

Se la granduloj havas okazon por fari al ni bonon, malofte ili havas volon por tio ; kaj se ili deziras fari malbonon al ni, ne ĉiam ili trovas okazon. Tial oni povas esti erarigita en la speco de kulto, kiun oni faras al ili, se ĝi estas bazita nur sur la espero aŭ la timo, kaj iafoje longa vivo finiĝas, sen ke oni okaze dependis de ili eĉ pri plej eta intereso, aŭ ŝuldis al ili sian bonan aŭ malbonan fortunon. Ni devas ilin honori, tial ke ili estas grandaj, kaj ke ni estas malgrandaj, kaj tial ke ekzistas pli malgrandaj, kiuj honoras nin.

Ekzistas tiaj homoj, kiaj, se ili povus koni siajn subulojn kaj koni sin mem, hontus pri sia supereco.

Senti la meriton, kaj, kiam ĝi estas ekkonita, bone trakti ĝin, jen estas du grandaj aferoj tuj farendaj, kaj por kiuj la plimultaj el la granduloj estas nekapablaj.

Se estas danĝere troviĝi implikita en suspektinda afero, estas ankoraŭ pli danĝere troviĝi en ĝi komplico de grandulo : li elturniĝas, kaj lasas vin pagi duoble, por li kaj por vi.

En la kortego kiel en la urbo, samaj pasioj, samaj malgrandaĵoj, samaj mensdifektoj, samaj malpacigoj en la familioj kaj inter proksimuloj, samaj envioj, samaj malsimpatioj. Ĉie bofilinoj kaj bopatrinoj, edzoj kaj edzinoj, eksedziĝoj, disrompoj kaj malbonaj reakordiĝoj ; ĉie mis-humoroj, koleroj, partiecoj, misrilatoj, kaj tio, kion oni nomas misparoloj. Per bonaj okuloj oni vidas senpene la urbeton, la Dionizi-straton kvazaŭ transportitaj en V aŭ en F\*. Ĉi tie oni kredas malami kun pli da fiero kaj alto, kaj eble pli da digno. Oni malutilas reciproke kun pli da lerteco kaj delikateco ; la koleroj estas pli elokventaj, kaj oni diras unu al alia insultojn pli ĝentile kaj en plibonaj vortoj ; oni ne vundas la purecon de la lingvo ; oni ofendas nur la homojn aŭ ilian reputacion : ĉiuj eksteraj as-

\* Versaĵlo, Fontanelo, loĝejoj de la riĉa kortego.

pektoj de malvirto estas bonŝajnaj, kaj la fundo, ankoraŭfoje, estas sama kiel en pli malaltaj situacioj. Tiuj viroj tiel grandaj, ĉu per sia naskiĝo ĉu per sia favoro aŭ indo, tiuj kapoj tiel fortaj kaj lertaj, tiuj virinoj tiel ĝentilaj kaj spritaj, ĉiuj malŝatas la popolon, kaj ili estas mem popolo.

Kiu diras "popolo", tiu diras pli ol unu aferon : ĝi estas vasta esprimo, kaj oni mirus pri ĉio, kion ĝi enhavas, kaj ĝis kie ĝi etendiĝas. Estas la popolo, kiu estas kontraŭa al la granduloj : ĝi estas la popolaĉo kaj la multularo ; estas la popolo, kiu estas kontraŭa al la saĝuloj, al la lertuloj kaj al la virtuloj : ĝi konsistas el la grandaj kiel el la malgrandaj.

La granduloj regas per sento ; senagaj animoj, al kiuj ĉio faras komence vivan impreson. Okazas io, ili tro parolas pri ĝi ; baldaŭ ili malmulte ĝin preparolos, poste jam ne parolas, kaj ne parolos plu pri ĝi. Ago, konduto, verko, evento, ĉio estas forgesita ; petu de ili nek ĝustecon nek antaŭvidon nek pripenson nek dankemon nek rekompencan.

Kiam mi vidas iujn, kiuj iam antaŭis min per siaj ĝentilaĵoj, nun atendas, ke mi ilin salutu, kaj estas al mi kiel pli al malpli, mi diras en mi mem : Tre bone, mi estas ravita, des pli bone por ili ; vi vidos, ke tiu ĉi homo estas plibone nutrata, loĝigita kaj meblita ol ordinare ; li estas jam kelkajn monatojn enirinta en iun aferon, en kiu li ricevis konvenan gajnon. Dio volu, ke post nelonga tempo li iros ĝis malŝato al mi !

Ci estas granda, ci estas potenca, tio ne sufiĉas ; faru, ke mi cin estimu, por ke mi maigajiĝu, se mi perdis ciajn favorojn, aŭ se mi ne povis ilin akiri.

... Ili estas malaltaj kaj timidaj antaŭ la princoj kaj la ministroj, plenaj de alteco kaj memfido antaŭ tiuj, kiuj havas nur virton ; mutaj kaj embarasataj antaŭ la kleruloj ; viglaj, aŭdacaj kaj decidemaj antaŭ la nenionsciantaj. Ili parolas pri milito al homo de robo\* kaj pri politiko al fi-

\* homo de robo : juristo.

nancisto ; ili scias la historion kun virinoj ; ili estas poetoj kun doktoro kaj geometroj kun poeto. Per maksimumoj ili ne sin ŝarĝas, per principoj eĉ malpli ; ili vivas laŭhazarde, puŝataj kaj trenataj de la vento de la favoroj kaj la logo de riĉaĵoj. Ili ne havas opinion propran ; ili pruntas ilin laŭbezone, kaj tiu, kiun ili pripetas, ne estas homo saĝa, lerta aŭ virta : li estas laŭmoda homo.

Ni havas kontraŭ la granduloj kaj altpostenuloj sterilan ĵaluzon kaj senpovan malamon, kiu ne venĝas nin je ilia splendoro\* kaj alteco, kaj nur aldonas al nia propra misero kaj al la neelportebla pezo de alies feliĉo. Kion fari kontraŭ animmalsano tiel enprofundiĝinta kaj tiel kontaga ? Ni kontentiĝu per malmulto, kaj eĉ per malpli, se eble ; ni scipovu laŭokaze perdi : la recepto estas senmanka, kaj mi konsentas provi ĝin. Tiel mi evitas provi favorigi al mi pedelon aŭ fleksi komisiiton, esti ĉe pordo repuŝita de la amaso da klientoj aŭ korteganoj, kiuj el la domo de ministro elfluas plurfoje en tago ; langvori en lia atensalono ; peti de li, tremante kaj balbutante, iun justan aferon ; elporti lian gravmienon, lian amaran ridon kaj lian lakonismon. Tiam mi ne plu malamas lin, mi ne plu envias lin ; li faras al mi nenian peton, mi faras al li nenian : ni estas egalaj, krom eble, ke li ne estas trankvila, kaj ke mi estas tia.

Se mi komparas la du statojn de la plej malsimilaj homoj, t.e. la granduloj kun la popolo, tiu ĉi ŝajnas al mi kontenta pro la necesajoj, kaj tiuj aliaj estas maltrankvilaj kaj malriĉaj kun la superfluaĵoj. Homo el la popolo ne povus fari ian malbonon ; grandulo volas fari nenian bonon, kaj estas kapabla pri grandaj malbonoj. Unu sin formas kaj ekzercas nur en aferoj utilaj ; la alia kunigas kun ili la malutilajn. Tie senartifike montriĝas krudeco kaj verdiro ; tie ĉi sin kaŝas malico kaj koruptita suko sub la ŝelo de ĝentileco. La popolo havas malmulte da sprito, kaj la granduloj ne havas animon ; tiu havas bonan fundon kaj nenian eksteron ; tiuj ĉi havas nur eksteron kaj simplan surfacon. Ĉu necesas elekti ? mi ne ŝanceliĝas, mi volas esti popolano.

\* splendoro : brilbeleco.

Se la pensoj, la libroj kaj la aŭtoroj dependus de la riĉuloj, kia proskribo ! ne estus apelacio. Kian tonon, kian superon ili prenas al si super la kleruloj ! Kian majeston ili afektas fronte al tiuj mizeraj homoj, kies merito nek altigas nek riĉigas ilin, kaj kiuj nur pensas kaj skribas ĝuste ! Konfesinde, la nuntempo estas por la riĉuloj, kaj la estonto por la virtaj kaj lertaj homoj. Homero ankoraŭ estas, kaj ĉiam estos ; la impostkolektistoj jam ne estas. Ĉu ili estis ? Ĉu ilia patrio, iliaj nomoj estas nun konataj ? Kio fariĝis tiuj gravaj personoj, kiuj malŝatis Homeron, kiuj sur la placo evitis lin renkonti, kiuj ne redonis al li la saluton, aŭ salutis lin per lia nomo, kiuj ne degnis kunvenigi lin al sia tablo, kiuj rigardis lin kiel homon neričan kaj librojn farantan ? Ĉu la Fauconnets\* iros tiel lontane en la postfamo kiel Kartezio ?

Dum la granduloj neglektas ion scii, mi ne diras nur pri la interesoj de la princoj kaj pri la publikaj aferoj, sed eĉ pri siaj propraj aferoj ; dum ili ignoras la ekonomion kaj la sciencon de familiestro, kaj sin mem laŭdas pri tiu nescio ; dum ili sin lasas malriĉigi kaj mastri de siaj intendantoj ; dum ili sin kontentigas estante frandemaj, vizitante Taisan aŭ Frineau, parolante pri ĉashundoj, diri kiom da etapoj estas de Parizo al Bizontio aŭ Filipsburgo, iuj civitanoj instruiĝas pri la interno kaj la ekstero de la regno, scias la fortan kaj la malfortan flankon de la Ŝtato, pripensas, kiel plej oportune sin situigi, altiĝas, potenciĝas. La granduloj, kiuj malŝatis ilin, nun ilin respektas ; feliĉaj, se ili fariĝas iliaj bofiloj.

Oni iras al malaj ekstremoj rilate al certaj personoj. Post ilia morto satiro kuras inter la popolo, dum la volboj de temploj resonas per laŭdoj al ili. Iajoje ili meritas nek pamfletojn nek funebrajn laŭdparoloj ; iajoje ankaŭ ili estas indaj je ambaŭ.

Oni devas silenti pri la potenculoj ; preskaŭ ĉiam estas flato diri bonon pri ili ; estas danĝero diri malbonon dum ilia vivo, kaj malkuraĝo post ilia morto.

\* Fauconnet (Fokone) : nomo de fama riĉa burĝo.

La lukso ĉe suvereno estas paŝtisto vestita per oro kaj gemoj, kun ora bastono en la mano ; lia hundo surhavas oran kolumon, ĝi estas ligita per ligilo el oro kaj sedo. Por kio utilas tiom da oro al lia grego aŭ kontraŭ la lupojn ?

G. havas freŝan haŭtkoloron, plenan vizaĝon kaj pendantajn vangojn, rigardon fiksan kaj memcertan, largajn ŝultrojn, altan stomakon, firman kaj decidan marŝtakton. Li parolas kun memfido ; li ripetigas la kunparolanton, kaj nur ete aprecas ĉion, kion tiu diras al li. Li malfaldas ampleksan naztukon, kaj brue purigas sian nazon. Li dormas tage, li dormas nokte, kaj profunde ; li ronkas en kompanio. Ĉe tablo kaj en promenado li okupas pli da loko ol iu alia ; promenante kun egaluloj siaj, li tenas la mezon ; li haltas, kaj oni haltas ; li plu ekmarŝas, kaj oni marŝas. Ĉiuj sin regulas laŭ li. Li interrompas, li rektigas tiujn, kiuj havas la parolvicon ; oni ne interrompas lin, oni aŭskultas tiom longe, kiom li volas paroli ; oni estas konsenta pri lia opinio, oni kredas la novaĵojn, kiujn li debitas. Se li sidiĝas, vi vidas lin enprofundiĝi en fotelon, krucigi siajn kruurojn unu sur la alian, sulkigi la brovojn, malaltiĝi sian ĉapelon por neniu vidi ; aŭ poste ĝin relevi por malkovri sian frunton pro fiero kaj aŭdaco. Li estas gaja, grande ridema, malpacienca, pretendema, kolerema, libertina, politikema, misterema pri la nunaj aferoj ; li kredas al si talentojn kaj spriton. Li estas riĉa.

F. havas kavajn okulojn, febran haŭtkoloron, sekan korpon kaj malgrasan vizaĝon ; li dormas malmulte, per tre leĝera dormo ; li estas abstrakta, revema, kaj li kun sprito ŝajnas stulta ; li forgesas diri tion, kion li scias, aŭ paroli pri okazoj de li konataj ; kaj se iajoje li tiel parolas, li malbone elturniĝas ; li rakontas mallonge sed malvarme ; li ne faras, ke oni lin aŭskultu, li ne ridigas. Li aplaŭdas, ridetas pri ĉio, kion aliaj al li diras, li dividas ilian opinion ; li kuras, li flugas por fari al ili etajn servojn ; li estas komplezema, flatema, rapidema ; li estas mistera pri siaj aferoj, iajoje mensoga ; li estas superstiĉa, skrupulema, timida. Li marŝas malrapide kaj malpeze, li ŝajnas timi treti la teron ; li marŝas kun mal-

levitaj okuloj, kaj ne aŭdacas ilin levi al la renkontatoj ; neniam li estas el tiuj, kiuj formas rondon por konversacii ; li sin metas malantaŭ tiun, kiu parolas, fuĝe kolektas tion, kion tiu diras, kaj retiriĝas, se oni lin rigardas. Li okupas neniom da loko, li tenas neniun spacon ; li iras kun kun-tiritaj ŝultroj, kun la ĉapelo mallevita sur la okuloj por ne esti vidata ; li sin kunfaldas kaj enfermas en sia mantelo ; ne ekzistas strato aŭ galerio tiom embarasita kaj tiom homplena, ke li ne trovus rimedon por pasi senpene, kaj sin savi sen esti vidata. Se oni petas lin sidiĝi, li sin metas sur la rando de seĝo ; en la konversacio li parolas mallaŭte, kaj malnete artikulacias. Libera tamen kun siaj amikoj pri la publikaj aferoj, li estas ĉagrena kontraŭ la jarcento, malmulte favora al la ministroj kaj la registaro. Nur por respondi li malfermas la buŝon. Li tusas, kaj nazpurigas sub sia ĉapelo ; li kraĉas preskaŭ sur sin, kaj li atendas, ĝis li estos sola, por terni, aŭ, se tio al li okazas, tio estas en nescio de la kompanio : tio kostas al neniun saluton aŭ komplimenton. Li estas malriĉa.

En ĉiaj situacioj la malriĉulo estas tre proksima de la boneco, kaj la riĉulo estas tre proksima de la friponeco. La farkapablo kaj la lerteco ne kondukas ĝis la grandegaj riĉoj.

Estas sur tero mizeroj, kiuj premas la koron. Al kelkaj mankas eĉ la nutraĵoj ; ili timegas la vintron, ili timas vivi. Aliloke oni manĝas frumaturajn fruktojn ; oni forcas la teron kaj la sezonojn por provizi al ilia delikateco ; simplaj burĝoj, nur pro tio, ke ili estas riĉaj, estas tiel aŭdacaj por gluti en unu sola peco la nutraĵon de cent familioj. Kiu volas, tiu rigardu sensente tiel grandajn ekstremojn ; mi volas, se mi povas, esti nek malfeliĉa nek trofeliĉa ; mi ŝetas min kaj rifuĝas en mezaĉon.

Oni scias, ke la malriĉuloj ĉagreniĝas, ĉar al ili mankas ĉio, kaj neniun malŝarĝas ilin ; sed se vere iuj riĉuloj koleras, estas tial, ke plej eta afero al ili mankas, aŭ ke iu volas rezisti al ili.

Tiu estas riĉa, kiu ricevas pli ol li konsumas ; tiu estas malriĉa, kies elspezo superas la enspezon. Iu kun du milionoj da rento povas esti ĉiujare malriĉa je kvincent mil pundoj.

Nenio pli longe subtenas onin ol meza riĉo ; de nenio oni pli rapide vidas la finon ol de granda riĉo. La proksima okazo\* de malriĉeco estas grandaj riĉaĵoj.

Se vere oni estas riĉa de ĉio, kion oni ne bezonas, riĉega estas saĝa homo. Se vere oni estas malriĉa pro ĉiuj aferoj, kiujn oni deziras, la ambicia kaj la avara kaŭras en ekstrema malriĉo.

La pasioj tiranumas la homon, kaj la ambicio haltigas en li ĉiujn aliajn pasiojn, kaj donas al li dum tempo la ŝajnon de ĉiuj virtoj. Tiu Trifon, kiu havas ĉiujn malvirtojn, mi kredis lin sobra, ĉasta, liberala, humila kaj eĉ devota ; mi plu kredus tion, se li ne estus fine riĉiĝinta.

En la mondo estas du manieroj por altiĝi : aŭ per sia propra lerteco, aŭ per la stulteco de aliaj.

La sano kaj la riĉaĵoj, prenante de la homoj la sperton pri malagrablaĵoj, inspiras al ili kordurecon al iliaj similuloj ; kaj la homoj jam ŝarĝitaj de sia propra mizero, estas tiuj, kiuj pli sentas, pro kompto, alies mizeron.

Se la ambasadoroj de fremdaj landoj estus simioj instruitaj por marŝi sur siaj malantaŭaj piedoj, kaj kompreniĝi per interpretistoj, ni ne povus marki pli grandan miron ol tiu, kiun donas al ni la ĝusteco de iliaj respondoj kaj la prudento, kiu iafoje sin montras en iliaj paroloj. La antaŭjuĝo pri la lando, kune kun la nacia orgojlo, forgesigas al ni, ke la racio estas en ĉiuj klimatoj, kaj ke oni ĝuste pensas ĉie, kie estas homoj. Ni ne ŝatus esti tiel traktataj de tiuj, kiujn ni nomas barbaraj ; kaj se estas en nia barbareco, ĝi konsistas el la teruro vidi aliajn popolojn rezoni kiel ni.

Ne ĉiuj fremduloj estas barbaraj, kaj ne ĉiuj el niaj samlandanoj estas civilizitaj.

Kun tiel pura lingvaĵo, tiel granda zorgo en la vestoj,

\* proksima okazo : teologia esprimo, signifas : okazo, kiu facile inklinigas onin al peko.

tiel kulturitaj moroj, tiel belaj leĝoj kaj blanka vizaĝo, ni estas barbaraj laŭ iuj popoloj.

Se ni aŭdus pri orientanoj, ke ili ordinare trinkas likvaĵon, kiu perdigas al ili la prudenton kaj vomigas ilin, ni dirus : "Tio estas ja tre barbara."

Iu estas riĉa per sia lerteco, li konas filozofon, liajn preceptojn, lian moralon kaj lian konduton ; kaj, ne imagante en ĉiu homo alian celon al ĉiuj liaj agoj ol tiun, kiun li mem proponis al si dum sia tuta vivo, li diras en sia koro : "Mi kompatas lin, mi rigardas lin kiel maltrafintan; li erarvagas, li estas ekster la vojo ; ne tiel oni prenas la venton, kaj alvenas al la delicplena haveno de la fortuna." Kaj, laŭ siaj principoj, li ĝuste rezonas.

Malgrandaj homoj, altaj je ses futoj, maksimume sep, kaj kiuj vin montras en foiroj kiel gigantojn kaj raraĵojn, se vi nur atingas ok futojn ; kiuj senpudore nomas vin Alteco aŭ Eminenco, kio estas ĉio, kion oni povus konsenti al tiuj montoj najbaraj de l'ĉielo, kiuj vidas nubojn sub sia supro ; speco de animaloj gloraj kaj superbaj, kiuj malŝatas ĉiun alian specon, kaj eĉ ne estas kompareblaj kun elefanto aŭ baleno, proksimen venu, homoj, kaj iom respondu al Demokrito. Ĉu vi ne diras kiel komunan proverbon : rabemaj lupoj, furiozaj leonoj, malica kiel simio ? Kaj vi, kio vi estas ? Mi konstante aŭdas korni en miajn orelojn : la homo estas prudenta animalo. Kiu aplikis al vi tiun difinon ? Ĉu la lupoj, la simioj kaj la leonoj, aŭ ĉu vi ĝin konsentis al vi mem ? Estus jam plaĉa afero, se vi donus al animaloj, viaj kunfratoj, tion, kio estas plej malbona, por preni al vi tion, kio estas plej bona. Lasu ilin iom difini sin mem, kaj vi vidos, kiel ili sin allasos, kaj kiel vi estos de ili traktata. Mi ne parolas, ho homoj, pri viaj vantaĵoj, viaj frenezaĵoj kaj viaj kapricoj - ili metas vin sub la testudo kaj la talpo, kiuj prudente iras sian malrapidan iradon, kaj senvarie sekvas la instinkton de sia naturo ; sed momenton aŭskultu min. Vi diras pri virfalko tre malpeza, kiu bele malsuprenflugas sur perdrikon : "Jen estas bona birdo" ; kaj pri leporhundo, kiu kaptas leporon je la korpo : "Ĝi estas bona leporhundo". Mi ankaŭ konsentas, ke ni diru pri homo, kiu kurĉasas apron, ĝin elpersekutas, ĝin fine atingas kaj mortpikas : "Jen

estas brava viro." Sed se vi vidas du hundojn, kiuj bojas, sin alfrontas, sin reciproke mordas kaj disŝiras, vi diras : "Jen estas stultaj animaloj", kaj vi prenas bastonon por ilin disigi. Se oni dirus al vi, ke ĉiuj katoj de iu granda lando kuniĝis po miloj sur ebenaĵo, kaj, ĝissate miaŭinte, sin ĵetis furioze unuj sur aliajn, kaj kune ludis per dentoj kaj ungegoj ; ke el tiu miksbatalo restis ambaŭflanke naŭ ĝis dek mil katoj sur la ebenaĵo, kiuj infektis la aeron ĝis dek leŭgoj\* per sia fetoro, ĉu vi ne dirus : "Jen estas la plej abomena sabatorgio, pri kiu oni iam aŭdis" ? Kaj se lupoj same agus, kiaj hurleĝoj, kia buĉado ! Kaj se unuj kaj aliaj dirus al vi, ke ili amas la gloron, ĉu vi konkludus de tiu diro, ke ili trovas ĝin en tiu bela rendezuo, en tiu memdetruado kaj neniigado de sia propra speco ? Aŭ, post kiam vi tiel konkludis, ĉu vi ne ridegus pri la stultego de tiuj povraj bestoj ? Vi, kiel prudentaj animaloj, kaj por distingi vin disde tiuj, kiuj uzas nur siajn dentojn kaj ungojn, vi jam imagis la lancojn, la pikstangojn, la sagojn, la sabrojn kaj la kurbosabrojn, kaj miaopinie, tre ĝuste ; ĉar per viaj solaj manoj, kion vi povus fari unuj al aliaj, krom deŝiri viajn harojn, skrapi viajn vizaĝojn, aŭ elŝiri viajn okulojn el la kapo ? Anstataŭe, jen vi estas provizitaj per oportunaj rimedoj, kiuj utilas por fari al vi reciproke larĝajn vundojn, el kiuj povos via sango flui ĝis la lasta guto, sen ke vi povu timi elsaviĝi. Sed, ĉar vi fariĝas de jaro al jaro pli prudentaj, vi bone superas tiun malnovan manieron por vin ekstermi : vi havas globetojn, kiuj mortigas vin per unu bato, se nur ili povas atingi vin je la kapo aŭ la brusto ; vi havas aliajn pli pezajn kaj pli masajn, kiuj distranĉas vin je du partoj aŭ vin traventrigas, ne kalkulante tiujn, kiuj falante sur viajn tegmentojn, traboras la plankojn, iras de la grenejo ĝis la kelo, forbatas ties volbojn, kaj suprensaltigas viajn akuŝiĝantajn edzinojn, la infanon kaj la mamnutristinon ; kaj ankoraŭ ĉi tie kuŝas la gloro, kaj ĝi estas persono de granda bruego. Vi havas ankaŭ defendajn armilojn, kaj vi devas en milito esti vestitaj per fero, kio estas, senmensoge, beleta ornamo, kaj memorigas min pri kvar famaj puloj, iam montritaj de ĉarlatano, subtila fabrikisto, en boteleto, en kiun li eltrovis la sekreton por ilin vivigi ; li metis al ĉiu kaskon sur la kapon, surmetis kirason kun brakumoj, genuumoj, lancon sur la femuro ; nenio

\* leŭgo : malnova franca longunuo = 4 km.

mankis al ili, kaj en tiu ekipaĵo ili iris per salto kaj salt-egoj en sian botelon. Imagu homon kun la staturado de Atos-monto : kial ne ? Ĉu animo estus embarasita por animi tian korpon ? Ĝi ja troviĝus en ĝi pli vaste lokita. Se tiu homo havus sufiĉe subtilan vidkapablon por eltrovi vin ie sur la tero kun viaj armiloj atakaj kaj defendaj, kion vi opinias, ke li pensus pri tiaj groteskaj etuloj tiel ekipitaj, kaj pri tio, kion vi nomas milito, kavalerio, infanterio, memorinda sieĝado, famega bataltago ? Ĉu do mi ne aŭdos ion alian murmuri inter vi ? Ĉu la mondo jam ne dividiĝas alie ol el regimentoj kaj kompanioj ? Ĉu ĉio fariĝis batalionoj aŭ eskadronoj ?

\*\*\*\*\*

### ŬAJRONKO

(kolibra, tombolenebria muŝo)

epitafe al Jose Maria Arguedas (1911-69), lingva pioniro kiu en noveloj "Akvo", "Sangfesto", "La profundaj riveroj", "El sexto" (malliberejo kiun li konis), "La vulpo de supre kaj la vulpo de sube" (l'indianaj Andoj kaj hispana Peruo) farĉis, trempis la hispanan per keĉua spirito...

Aŭguras morton ĉiririnko,  
brilblua muŝo; sen kipu' -  
kontret' - inkaan fonton trinki...

(*gvanakoj*, lamoj kaj vikunoj;  
seninka lingv', en kiu *unu*  
signifas (sanktan) akvon, *kuna*  
pluralon)

... nokte *pukupuk'*  
funebros - kune kun kolomb'  
en *lambroj*, dorna vepr'; al tomb'  
- *pukulo*, tura katakomb' -  
smeralde vibras verd' : kolibro.

Meva Maron

\*\*\*\*\*



Paco : mortdanĝero

*Komence de 1988, J.M. Tĵibaŭ, ĉefa luktanto por sendependeco de Kanakio, subskribis kun J. Lafleur, reprezentanto de la "kaldoĉoj" (blankaj francdevenaj kolonianoj) pakton por paca kunvivado inter la du etnoj. Dank'al tiu akordo, dum tuta jaro efektive regis trankvilo en Novkaledonio.*

*Sed tial la plej fervoraj el la kanakaj patriotoj taksis sian ĉefon pri perfido. Kaj la 4an de majo 1989, unu el ili murdis lin kaj lian plej fidelan leŭtenanton.*

*En la samaj tagoj Jaser Arafat, gvidanto de la arabpalestina rezistado kontraŭ Izraelio, faris gravan paŝon al paco. Pro tiu bonvola gesto, li estis same akuzita pri perfido de la plej radikala aĵo el la muzulmana palestina partio, kaj kondamnita al morto. Kaj kiel averto kaj komenco, estis murdita lia oficiala reprezentanto en Libano.*

*Kiom da krimoj en la nomo de raso, etno, patrio, nacio aŭ religio ! Kiom da murdoj faritaj ĉu de rektaj malamikoj, ĉu de tro fervoraj sampartianoj ! Ni nur memoru pri Gandhi, Martin Luther King, pri la du moderaj muzulmanoj freŝdate murditaj en Bruselo...*

*Konklude : Se vi volas pacon, preparu vin al perforta morto.*

\*\*\*



## Burleskaĵo en Pariza Tribunalo

**Antaŭ** ducent jaroj la Franca Revolucio abolis la nobel-titolojn. Tamen sufiĉas foliumi gazetojn kiel "Figaro" aŭ "Le Monde" por legi, en informoj pri naskiĝoj, geedziĝoj aŭ mortoj, nomojn de baronoj, grafoj, markizoj, dukoj aŭ princoj. Ili apartenas al familioj nobeligitaj ĉu de la iama reĝa monarkio, ĉu de imperiestro Napoleono. Ili plejofte konservis aŭ reakiris siajn heredajn bienojn kaj aliajn riĉaĵojn. Kelkaj estis aŭ estos ministroj, kelkaj okupas altajn postenojn en la respublika ŝtato.

Antaŭ nelonge en Parizo okazis stranga proceso. Antaŭ respublika tribunalo pledis du rivalaj Burbonidaj kuzoj. La juĝistoj devis determini, kiu el ili estas la pli legitima pretendanto de la reĝeco en Francio. Kredeble tiuj dignaj juĝistoj havis nenion pli urĝan por fari.

Oni diras, ke en Francio ridindeco estas mortiga. Tamen mortis neniu el la du princoj nek el la tri juĝistoj nek la advokatoj. Nek la ĵurnalistoj, kiuj tre serioze raportis pri tiu grandioza farso.

### "Skandaloj"

En lasta aprilo S-ro T., ĉefministro en ekstremorienta regno, vidinte sian popularecon sinki ĝis ega profundo, demisiis. Sed antaŭe, ĉe la tribuno de la deputitara asembleo, li konfesis, ke li ricevis grandegan monsumon por favori gravan mendon de la ŝtato al potenca industria firmo. Tute senĝene : ĉar tion li trovis normala.

Kaj prave ! Kial krii pri skandalo ?

Tio estas ja konforma al la moroj de nia socio. Tiel riĉiĝas altpostenaj ŝtatfunkciuloj, ministroj, influhavaj politikistoj, kaj tiel prosperas grandaj firmoj kaj bankoj, je kosto nur de la laboranta popolo.

Tio okazas en niaj okcidentaj "liberalaj" demokratioj, kaj same en la orientaj t.n. "socialistaj" aŭ "demokratiaj popolrespublikoj" - do ĉie en la mondo. Korupto estas normala fenomeno en ĉiuj landoj.

Se ni retrorigardas en la historio 200 jarojn antaŭe, ni

vidas en Francio similajn aferojn, tiel en la konstitucia reĝregno de 1789-1792 (Mirabeau), kiel en la Unua Respubliko (Danton kc.). Ne koruptitaj estis Marat, Hébert, Baboeuf k.a., kaj Robespierre la Nekoruptebla. Cetere, la falo kaj morto de tiu ĉi estis provokita de profitej aferistoj kiel Tallien kaj Barras. Kaj en la postaj reĝimoj, ĉu monarkiaj, ĉu respublikaj, de tempo al tempo ekfloris novaj financaj skandaloj. De kiam la mono, kreita kiel oportuna rimedo por interŝanĝi varojn, fariĝis mem taksata valoro, la putriga mono servas por aĉeti la elastajn konsciencojn de eminentuloj. Tiu procezo komenciĝis frue en antikvaj socioj, kaj disvolviĝis kun la teknika progreso.

Krom en kelkaj okazoj, en kiuj eksplodas "skandalo", la profitantoj de tiu kutimo estas alte konsiderataj kaj honorataj. Ni relegu la Proverbaron de Zamenhof :

**Groŝon ŝtelis - ho! ŝtelisto!**

**Milojn ŝtelis - financisto.**

Nu, en niaj prosperaj landoj, - en kiuj tamen ekzistas mizero -, ni povus indulge ridi pri tiaj aferoj, se la universala koruptado ne atingus ankaŭ la Trian Mondon. Tie, en ekskolonioj daŭre ekspluatataj de novkoloniistoj, kelkaj potenculoj grasiĝas, dum milionoj da mizeruloj mortas pro malsato aŭ pro kuraceblaj sed ne kuracataj malsanoj. Tio ne estas ridinda, sed ja plorinda.

### Lando de miaj revoj

**Mi** revas pri Antilioj, tiuj foraj insuloj, kiujn mi neniam vidis, tiu paradizo, kie abundas floroj kaj fruktoj, arboj kaj birdoj. Kie vivas, krom eble kelkaj spuroj el la origina karaiba raso, bunta popolo el homoj, kies haŭtkoloro varias de nigro, heredita de sklavoimportitaj el Afriko, al blanko konservita en idoj de eŭropaj koloniaj mastroj, tra ĉiuj nuancoj : mulatoj, "mestifoj", "hasprojoj", "grifoj", kvarteronoj (nur kvarone nigraj). Kvarteroninoj estas ofte tre belaj kaj ĉarmaj. La pure blankaj estas solaj proprasence kreoloj (PIV). Sed en la komuna parolpraktiko la vorto etendiĝis al ĉiuj Antilianoj el kiu ajn haŭtkoloro.

Kiam mi estis 18-jara, en mia lerneja klaso en Aix-la-Provenca alvenis tri kolorhaŭtaj martinikanoj, kun kiuj mi tre simpatiis.

Kelkajn jarojn poste en Parizo mi konatiĝis kun pluraj familioj samdevenaj, inter kiuj estis neniu vera kreolo, ĉiuj koloraj. Baldaŭ mi komprenis kaj komencis paroli la "kreolan" dialekton, kiun ili kutime uzis inter si.

Mia amikino Zaza sin mem nomis mia kreolineto, kvankam ŝi estis hasprino, t.e. trikvarone nigra. Ŝi havis klaran voĉon de insula birdo, kiel la bela kvarteronino Jozefine Baker. Sin lulante sur rocking-chair (balanĉfotelo) en ĝardeno, ŝi kantis por mi kantojn el sia insulo, kiujn ili nomas "bels-airs" (belaj arioj). Inter ili la fama melankolia adiaŭo de martinika amantino "Foriris dudu mia". Ĉu ŝi jam antaŭsentis nian estontan disiĝon ?

(Pardonu tiun devojiĝon de la plumo de maljuna revulo. Komencante tiun ĉi skribon, mi ne intencis paroli pri unu aparta persono, sed pri Antilioj kaj Antilianoj entute).

Bonaparto konsulo, malgraŭ la egaleco inter ĉiuj homoj proklamita en la Deklaracio de Rajtoj, malpermesis la mikstrasajn geedziĝojn. Oni povas mezuri la legĉan kaj moran evoluon, nun kiam tiaj geedziĝoj estas ne nur licaj, sed pli kaj pli oftaj.

En okcidento, spite la persistemon de funda rasismo, oni malpli kaj malpli atentis la koloron de la haŭto. En niaj universitatoj la blankaj studentoj frate kunvivas kun flavaj kaj nigraj kompanoj. Sur niaj scenejoj estas aplaudataj koloraj artistoj, ne nur kantistoj de ĵazo aŭ de negro-spirituals, sed ankaŭ de klasikaj melodioj aŭ operoj. En *Karmen* oni vidis sen miro la tradicie blondan Mikaela sub la trajtoj de Barbara Hendriks. Mi ne mirus, se blonda tenoro tenus la rolon de la maŭro Otello, aŭ nigra soprano tiun de la valhuro Brunhilda. Per interpenetrado de diversaj etnaj tradicioj ni konstatas ekfloron de tutplaneda kulturo.

Tio estas progesa procezo, kiu havis sian deirpunkton antaŭ kvar jarcentoj, meze de la sociaj cirkonstancoj kreitaj de la barbareco de kolonismo kaj sklavigado, precize en tiuj Antiliaj insuloj.

*Vala.*

## ĈU LA PJEMONTA DIALEKTO

### ESTAS "FRANCDEVENA" ?

Ĉi-somere, en junio, mia edzino kaj mi estis en Balaruc les Bains por revidi, post 31 jaroj, niajn malnovajn gemikojn Dazun. Mi ekkonis ilin en 1949, okaze de la Pariza kongreso de SAT. Tiam mi fariĝis peranto de SAT por Italio, partoprenis multajn kongresojn (ankaŭ de SAT-Amikaro) kaj organizis la SAT-kongreson en Torino, en 1950. Mi daŭre laboris kun Barthelmess, Bannier, Piron, Glodino, kaj multaj aliaj. Ĉiuj ĉi, bedaŭrinde, malaperis! Kiom da ĝojo, do, ni havis, revidante ge-Dazunojn ĉiam viglajn kaj en bona sano !

Okaze de babilado pri dialektoj, mi interesiĝis pri gaskona dialekto (ĉar Edmondo estas gaskono), kaj mi "aser-tis", ke pjemontano povas ĝin sufiĉe bone kompreni (same kiel katalunan kaj provencan), ĉar la pjemonta dialekto estas francdevena. Dazun invitis min verki artikolon pri tio : jen ĝi!

Povus ŝajni strange, ke ni interesiĝas pri lingva temo, kiu ne estas esperanto... sed kulturo estas kulturo kaj estas mirinde, ke per esperanto ni povas "disertacii" pri ĉio ajn.

La afero estas sufiĉe serioza kaj pri ĝi floras elstaraj studoj de universitataj profesoroj. Mi penos ne esti teda tiel, ke la argumento povu vekii intereson en ĉiuj legantoj.

Iomete da teorio, tamen, mi devas citi.

Preskaŭ ĉiuj spertuloj akordiĝas pri la fakto, ke nord-italaj dialektoj ne estas italdevenaj, sed francdevenaj. Kompreneble, dialektoj kaj lingvoj pri kiuj mi parolas apartenas al la tiel diritaj novlatinaj lingvoj. Tio valoras por hispana, portugala, franca, itala, provenca, ladina kaj rumana lingvoj.

La "galloromanaj" lingvoj estas kutime dividataj en tri grupoj : la franca, la francoprovenca, la okcitana. Vi certe scias, ke la franca venas de la "lingvo d'oil" kaj, ke la okcitana venas de la "lingvo d'oc". Ĉiuj bone scias, kie oni parolas france, ĉu pro historiaj kaŭzoj (en Eŭropo), ĉu pro aliaj kaŭzoj (en la mondo).

La okcitana lingvo estas parolata en suda Daŭfenlando, en Provenco, en Aŭvernio, en Langvedoko, en Gieno, en Limoĝio, en Gaskonio, en la gaskona valo de Aran, kaj en Katalunio (ambaŭ en Hispanio). En Pjemonto la okcitana lingvo estas parolata en multaj valoj ĉe la Alpoj (Valoj de Suzo, Pélliĉe, Kizone, Po, Varajta, Majra, Pezjo, Ĝermanaska ktp.). Ĉar grupo de pjemontaj familioj (valdezoj) estis ekzilitaj en Kalabron (en la 16a jarcento), ankaŭ en Ĝardja Pjemonteze (Kosenco) oni parolas okcitane.

La francoprovenca parolata ĉe Liono, en la montoj de Forez, en norda Daŭfenejo, en Savojo, en suda Franĉkonteo, en romanda Svisio, floras en Pjemonto en la Valo de Aosto, Suzo, Valo Soana, kaj en aliaj pli malgrandaj valoj. Intere estas noti, ke en multaj valoj, proksime de Alpoj, en la regionoj de Aosto, Suzo, Pinerolo, Kúneo (ne en la ebenaĵo), la homoj parolas itale, france, pjemonte kaj dialekte (tiuj dialektoj estas nomataj "patois" eĉ en pjemonta dialekto).

Kiam mi, dekkvinjara, vivis en Torino, ĉefurbo de Pjemonto, tiam la pjemonta dialekto tie parolata estis pli trafa ol nun. Mi povus diri, ke ĝi estis pli delikata ol aliaj pjemontaj dialektoj, pli klare kaj simple parolata. Kompreneble, la plej riĉaj parolantoj estis kulturitaj personoj: advokatoj, kuracistoj, amatoroj. Ekzistis eĉ iu torina "slango", kiun ni buboj fieris koni... Sed jam tiam alvenis en Torinon loĝantoj de neproksimaj urbetoj kaj vilaĝoj kaj la dialekto komencis perdi sian "purecon". Poste, en la jaroj 1950-80 venis tiom da suditaloj, kiuj kompreneble serĉis tie postenon, ke pro tio la dialekto ĉiam pli italiĝis. Tamen estas pluraj asocioj, kiuj zorgas pri revuoj kaj gazetoj; estas poetoj, kluboj, kunvenoj, ktp. La vera pjemonta dialekto troviĝas en tuta Pjemonta, en preskaŭ similaj formoj, ankaŭ se kun kelkaj diferencoj.

Kaj nun ni praktike interesiĝu pri pjemonta dialekto.

Antaŭ ĉio ni devas atenti pri kelkaj elstaraj diferencoj inter pjemonta kaj franca prononcado. Ekzemple, ne ekzistas en pjemonta dialekto la "nazumitaj" sonoj (indécis, mont, environ). Oni legas la literojn kiel ili estas (preskaŭ en esperanto!). Ne ekzistas la sono "j" de "joli"; "ch" oni legas "k". "C" kun i,e estas legata "ĉ".

Por indiki al vi la ĝustan legmanieron de pjemontaj vortoj mi proponas jenon: bonvolu legi ĉion, kiel en esperanto; vi devas nur aldoni du vokalojn: "ü" (dur) kaj "ö" (feu). La ceteron vi certe komprenos, ĉar estas ĉiam sufiĉe da proksimeco inter la franca kaj la pjemonta.

Por komenci, jen kelkaj vortoj, kiuj estas tute egalaj:

bec (bek), bloc (blok), client (klient'), brun (ü), col (kol), art (art), credit (kredit), debit (debit), dent (dent), desert (dezert'), destin (destin'), fait (fait), feu (fö), fisc (fisk), fol (fol), grand (grand), futur (fütür), galop (galop'), ideal (ideal'), inedit (inedit), intestin (intestin'), lapin (lapin'), lard (lard), lot (lot), mari (mari'), mars (mars), metal (metal'), nasal (nazal'), nom, parc, part, lait (lait), lin (lin), marin (marin'), pur, porc, prefet (prefet'), quadrant (kŭadrant'), rat (rat), rabot (rabot'), radis (radis'), safran (safran'), ski, stuc, suc, tapis (tapis'), tard (tard), tir, tort (tort), trafic (trafik), tribu, tabac (tabak'), truc, vin (vin), uni, viril, cru, capital (kapital'), diamant (djamant')

Ne forgesu legi la vorton interkrampe en esperanto; la signo (') indikas, kiel en esperanto, kien falas la akcento. Vi povas imagi, tamen, ke samaj aŭ preskaŭ samaj vortoj estas centoj kaj eĉ miloj.

Kaj jen nun kelkaj vortoj, kiuj havas malsaman grafion sed saman prononcmannieron; (la vorto interkrampe estas franca):

aj (ail), maleur (malheur), amor (amour), cheur (coeur), tajeur (tailleur), parur (parure), patua (patois), tiré (tirer), travaj (travail), rido (rideau), parlé (parler), boric (legu "burik", bourrique), cado (legu: kado', cadeau),...

Kiel jam dirite, la grupo "ch" fariĝas "c" (k):

champ-camp (kamp), chanson-canson (kansun'), chant-cant (kant), charbon-carbon (karbun'), chaud-caud (kaùd), champion-campion (kampjun'), chantier-cantié (kantje')...

La finaĵo "eau" ofte fariĝas "el":

beau-bel, chapeau-capel (kapel'), anneau-anel (anel'), château-castel (kastel')...

Ĉi-lastaj vortoj montras alian diferencon; kiam en franca estas (ˆ) (ekz.: châtaigne, bête) en pjemonta dialekto oni aldonas preskaŭ ĉiam "s":

bête-bescja (besĉa), tête-testa, fête-festa, coûter-coŝtè (kuste'), fantôme-fantasma (fantazma), gâter-goastè (gŭaste'), hôpital-ospital (uspidal'), impôt-imposta (imposta), marâtre-marastra...

La plejparto de francaj vortoj kun "o" estas legataj kun "u" (kiu tamen estas skribata "o") :

abandon-abandon (abandun'), allonger-alonghé (alunge'), position-posision (puzisjun'), décision-decision (deĉizjun'), convocation-convocasion (kunvukasjun'), coton-coton (kutun'), rognon-rognon (rugnun')...

Ne ekzistas en piemonta dialekto la sono "j" de "joli". Ĝenerale oni uzas "g" (legu "ĝ" en jenaj vortoj) : jalousie-gelosia (ĝelosia), jambon-gjambon (ĝambun'), jardin-gjardin (ĝardin'), jarretière-gjaretiera (ĝaretjera), journal-gjurnal (ĝurnal'), juste-gjust (ĝüst), jeton-geton (ĝetun')...

La afero povus daŭri longe, sed mi absolute ne volas tedi vin. Se vi havas specialan intereson, skribu rekte al mi. Eventuale, en venonta numero, mi povos prezenti tekstojn en gaskona, provenca, kataluna, piemonta, ktp.

Sendube vi komprenas rekte jenajn vortojn : gravura, anciarmant, piuma (plume), euvra, apopré, mersi, vassi (voici), bolversement, but, amusanta, afranchisse, anviron, passionant, masculin, fonnin, aspars, articjoc (l. artiĉok'), ancjua (l. anĉua), aperitiv, argent (l. arĝent'), avril, bajé (l. baje'), bersò (l. berso'), bergé (l. bergé'), bombon (l. bumbun'), casarola, sintura, sagrin (l. sagrin'), causet (l. kaŭset'), cocomber, dicember, consej (l. kunsej'), cavalet (l. kavalet')...

Ofte mi havis okazojn esti en Daŭfenlando, Provenco, Savojo : la menso de kamparanoj, laboristoj, gejunuloj estas tute sama kiel en Piemonto. Piemontano tre facile kondutas kun ili, kaj li havas tute samajn naturajn instinkutimojn.

Lasta rimarketo. En n-ro 430 de SAT-Amikaro (dec.1987) Michèle Freud prezentis simpatian artikolon pri "La Provencaj Santonoj". Ĉio entenata en tiu artikolo plene koncernas Piemonton (kaj ankaŭ aliajn regionojn de Italio). Eĉ kelkaj detaloj pri la kristnaska staltrogo (urbestro kun trikolora skarpo, muelisto, fiŝisto, akriĝisto, gaja lavistino) estas tute samaj.

Finfine, ne forgesu, ke Torino estis la sidejo de Savojo-familio, kaj estis siatempe konsiderata "malgranda Parizo" speciale pri modo, avenuoj, aŭtomobiloj, ktp.

Mario Guzzi

Via Madonnina 2/3, I-16016 COGOLETO (Ge)

~~~~~

" BASIC ENGLISH "

kaj limigataj vortprovizoj

"BASIC English" estas lingvo inventita de C.K. Ogden en 1930 por esti internacia lingvo; laŭ Ogden, ĝi estas pli bona ol Esperanto por tiu uzo. BASIC devus esti akronimo por "British American Scientific International Commercial", sed la vorto ankaŭ priskribas la sistemon, ĉar ĝi estas kvazaŭ baza versio de la angla. La gramatiko estas kiel tiu de la angla, sed la sistemo uzas nur 850 vortojn, kiujn oni povas listigi sur unu paĝo. Por montri, ke tiuj vortoj sufiĉas por skribi pri iu ajn temo, oni tradukis kelkajn librojn el la angla en BASIC, kaj oni produktis vortaron angla-BASIC, kiu enhavas artikolojn kiel : "coffin : box for a dead body", "coin : metal money", aŭ "cog : pointed tooth on a wheel". Homo, kiu scipovas la anglan, povas legi en BASIC, kvankam la frazoj kelkfoje estas iom longaj kaj konfuzantaj.

BASIC estis subtenata de Churchill kaj de Roosevelt dum la jaroj 40aj, kaj la sistemo ŝajnis posedi kelkajn avantaĝojn :

- * Kun nur 850 vortoj, ĝi povas esti rapide lernebla.
- * Ĝi povas helpi kun la lernado de la angla, kaj du homoj, kiuj ambaŭ lernis BASIC, povas komunikiĝi, kvankam du homoj, kiuj ambaŭ lernis mil vortojn de la angla verŝajne ne povus komunikiĝi. (Verŝajne ili ne lernis la samajn mil vortojn). Do BASIC povas helpi kun la uzo kaj disvastigado de la angla.
- * BASIC jam posedas literaturan tradicion, ĉar angla literaturo estas facile tradukebla en BASIC.

Malgraŭ tiuj ŝajnaj avantaĝoj BASIC estas nun preskaŭ

forgesita, kaj estas interese kompreni, kial BASIC tute ne taŭgas kiel internacia lingvo.

* Unue, Ogden friponis! La sistemo uzas pli ol 850 vortojn, ĉar skribanto en BASIC rajtas uzi krom la 850 vortoj de BASIC iun "internacian" vorton, en ĝia angla formo. Tio enmetas ĉiujn nomojn de landoj, ĉiujn kalendarajn nomojn, kaj multajn tre necesajn vortojn kiel "telephone", "electricity", "automobile". Komprenoble, multaj de tiuj vortoj ne estas vere internaciaj; "Finland" nomiĝas "Suomi" inter finnlandanoj, kaj la tri "internaciaj" vortoj, kiujn mi ĵus menciis, estas en la islanda : "sími", "rafmagn", kaj "bflí" aŭ "bifreid".

* Por ne uzi ekstrajn vortojn, BASIC uzas multajn idiomojn, kiujn anglo povas kompreni, sed kiuj estas por homo, kiu ne scipovas la anglan, multe malpli facile lerneblaj ol novaj vortoj. Ekzemple estas certe pli facile lerni la novan vorton "toleri" ol la BASIC idiomon "put up with", aŭ la Esperantan vorton "konfuzi" ol la BASIC idiomon "put at a loss". La uzo de tiaj idiomoj en BASIC faras al la nombro 850 senrilatan statistikon.

* Kvankam angloj aŭ amerikanoj povas legi en BASIC, estas malfacile por ili skribi en BASIC, kaj multaj rifuzas lerni lingvon, kiu ŝajnas "profani" la anglan.

* Mankas al BASIC la neŭtraleco de Esperanto. Kiam ĉino parolas al ruso en BASIC, iu anglo aŭ amerikano povas kompreni, sed kiam amerikanoj kaj angloj parolas inter si, ili uzas pli ol 850 vortojn, kaj la fremduloj ne povas kompreni. Komprenoble, ĉi tiu trajto de BASIC povas esti rigardata kiel avantaĝo de tiuj, kiuj volus gardi la "super-econ de la angla-parolantaj popoloj" !

* BASIC ne estas tiel facile etendebla kiel Esperanto. Estas manko de la angla lingvo, kies gramatikon uzas BASIC, ke ĝi ne permesas la logikan konstruadon de novaj vortoj per sistemo de afiksoj. Por vidi la superecon de Esperanto, traduku ĉi tiujn vortojn kaj en la anglan kaj en BASIC : rapideco, feliĉigi, pligrandigi, grandeco.

Kvankam BASIC estas mortinta, la ideo, sur kiu ĝi baziĝas, tiu de limigata vortprovizo, ne estas morta. La ideo ne donas al ni internacian lingvon, sed ĝi havas uzojn. Ek-

zistas almenaŭ unu vortaro angla-angla, kiu uzas limigatan vortprovizon (sed kun pli ol 850 vortoj!) en ĉiuj difinoj, por helpi lernantojn kaj eviti "cirklajn difinojn". Do ĝi similas iomete al la vortaro angla-BASIC de Ogden. Limigataj vortprovizoj estas uzitaj tre sukcese por helpi lernantojn de lingvoj, kaj mi mencias kelkajn bonegajn ekzemplojn.

"Grafisk Forlag" en Danujo produktas multajn librojn uzantajn limigatajn vortprovizojn en tuta aro de lingvoj. Por ĉiu lingvo estas difinita baza vortprovizo de 800 vortoj, malpli baza vortprovizo de 1200 vortoj, ktp, por doni 4 nivelojn de lingvo. Versioj de famaj libroj estas eldonataj, kiuj uzas nur la vortojn el unu de tiuj bazaj vortprovizoj. Tamen, por fari la librojn pli legeblaj, vortoj, kiuj ne estas en la respektiva vortprovizo, estas kelkfoje uzataj en la teksto, kun klariga noto sube sur la paĝo. La klariga noto uzas nur la vortojn de la respektiva vortprovizo, komprenoble.

"Larousse" produktis bonegan vortaron de la franca lingvo, kiu uzas kelkajn limigatajn vortprovizojn : unue, la vortprovizon de la "Français Fondamental" - 1450 vortojn; due, ekstrajn 1131 vortojn, por doni la "vocabulaire de base" - 2581 vortojn; fine, ekstrajn 5100 vortojn por doni vortprovizon de preskaŭ 7700 vortoj. La vortaro enhavas artikolon por ĉiu vorto en la "vocabulaire de base", kaj en ĉiu artikolo estas kelkaj ekzemploj de la uzo de tiu vorto, gramatikaj klarigoj, kaj klarigoj pri la signifoj de rilatantaj vortoj en la pli granda vortprovizo de 7700 vortoj. Sume estas 12 000 ekzemplaj frazoj, uzantaj nur la 2581 vortojn de la "vocabulaire de base", por helpi la studenton iĝi facilparola kun tiuj vortoj. La vortaro enhavas ankaŭ indikson de la 7700 vortoj.

"Ernst Klett" produktas vortprovizo-librojn kaj por germanoj, kiuj lernas fremdan lingvon, kaj por fremduloj, kiuj lernas la germanan. Por anglo, kiu lernas la germanan, estas "Grund- und Aufbauwortschatz Deutsch (Englisch)". La unua parto de la libro estas la "Grundwortschatz" : la plej utilaj 2000 vortoj, alfabeto ordigitaj, kun ekzemploj de uzo kaj tradukoj. La dua parto estas la "Aufbauwortschatz" : 3000 ekstraj vortoj, aranĝitaj laŭ temo en 74 grupojn, kun utilaj esprimoj. Ĉi tiuj libroj de Ernst-Klett

aŭ ingenraj. Tamen en E. la adjektivaj varias laŭ la nombro kaj la akuzativo. Ĉar ili ĉiam akompanas la substantivojn, kiujn ili kvalifikas, ĉu la sama regulo kiel por la verboj ne povus esti aplikata : la nevariebleco de la adjektivaj ? Rezultus de tiu nevariebleco, ke la adjektivaj ĉiam finiĝus per A. Malaperus la finaĵoj AJ, AJN. Tio por la adjektivaj. Nun, pri la akuzativo.

Jen citaĵo de teksto de Zamenhof el "Lingvaj Respondoj" (p.68-74) : "La akuzativo estas enkondukita nur el neceso, ĉar sen ĝi la senco ofte estus ne klara, sed ĝia uzado ~~en~~ okazo de nebezono pli multe malbeligas la lingvon ol la neuzado en okazo de bezono." Kelkaj ekzemploj estas pli utilaj ol subtila rezonado de gramatikistoj. La simpla frazo : "La patrino amas la filino (sen N) nenion signifas en E. Do, oni devas aldoni N, aŭ al "patrino", aŭ al "filino". Sed, se mi skribas : "Mi malfermas la fenestro (sen N), eĉ komencantoj scias, ke la objekto estas "la fenestro", ĉar ne eblas, ke la fenestro malfermas miN. Mi lernis Esperanto(N). Ne eblas, ke Esperanto lernis miN! Ĉar la dubo ne estas ebla, ĉu en tiuj kazoj la N ne superfluas ?

Kvankam mi tre ŝatas la artikolojn de VALO, tamen ŝokis min la sekva frazo : "Ĉi tie mi povas citi Viktoron Hugon (L! 79 p.8). Mi konsentas, ke tio estas gramatike regula, sed ne estas dube, ke V.H. estas la objekto, do laŭ mi la N estas superflua, des pli ke ĝi fuŝas la propran nomon.

Koncerne la sufiksojn IG - IĜ (verboj transitivaj kaj ne-transitivaj), unuflanke oni legas en "Lingvaj anguloj" (p.31/32) : "La verboj estas nur transitivaj aŭ nur ne-transitivaj (Konsultu la P.V. kaj P.I.V.)". Aliflanke oni legas : "La sufikso IG netransitivigas transitivan verbon kaj "IĜ" transitivigas ne-transitivivan verbon" (same). Ĉu ne ekzistas kontraŭdiro inter tiuj du asertoj ? Se ni devas ĉiam konsulti vortaron por scii, ĉu ni ne eraras, kiam estas pli simple sin bazi sur la kunteksto kaj nur uzi la finaĵon I anstataŭ IG-IĜ.

Ekzemple : "La infanoj pligrand(-ig-)is la sablokastelo(N). La infanoj rapide pligrand(-ig-)is. Sajnas al mi, ke la kunteksto donas sufiĉe da precizeco al la signifo de la verboj, sen aldono de IG-IĜ.

Laŭ la vortaro (kial ne vortlibro, kiel en la nederlanda lingvo?) ekzistas la verboj : blankigi, blankiĝi, sed ne blanki. Kial ? Sen kunteksto tiuj verboj estas pravigeblaj, sed kun kunteksto ni scias, ĉu la verbo estas aŭ ne transitiva. Se mi diras : "Mi blank(-ig-)as la plafono(n), la verbo estas transitiva, ĉar sekvata de la objekto "plafono". Se mi diras : "Lia vizaĝo blank(-ig-)as pro timo", la verbo estas ne-transitiva, ĉar ne sekvata de objekto. Do, kiam la kunteksto tion ebligas, ĉu ni ne povus forigi la sufiksojn ig, iĝ ? Mi dirus kiel Zamenhof pri la akuzativo, ke estas malpli grava ne uzi ig kaj iĝ en kazo de bezono ol misuzi ilin.

Resume : Zamenhof kaj liaj unuaj kunlaborantoj volis, ke ĉiuj vortoj havu tre precizan kaj unikan signifon ; sed ili forgesis, ke la kunteksto povas ankaŭ doni precizecon al vortoj, sen neutile balast(-ig-)i ilin. Ni atentu tamen, ke ne temas anstataŭ(-ig-)i iun eksceson per alia. Ni devas atenti, ke la forigo en iuj okazoj ne ŝanĝas la signifon de vortoj aŭ frazoj.

Mi pensas pri la aeronauto, kiu senbalast(-ig-)as la balonon por lia plialtiĝo. Ĉu la senbalastigo de la superfluaj sufiksoj ne havus la saman efikon por E., ke ĝi pli facile estus akceptita de pli multaj personoj kaj ĉefe malpliigus tiujn, kiuj forlasas la lingvon, ĉar, laŭ ili, ĝi estas laciga, teda kaj monotona ?

Konklude, mi revenas al tio, kion mi skribis en L!76, p.27 : Plibono estas malamiko de bono.

REJAL

PLEDO POR AKTUALIGO DE LA FUNDAMENTO

(Atentu, la sekva teksto estas skribita laŭ la proponoj indikitaj en la ĉi-supra artikolo)

Ne temas pri grandskala ŝanĝo de la gramatika reguloj, sed nur adapti al la nuntempo, ĉefe la antaŭparolo kaj inkludi en la gramatika reguloj la principo de sufiĉo kaj neceso. Ni devas esti ĉiuj konscia ke la Fundamento estas nepre necesa por la bono de E. Alie ni havus rapide tiom da interpretoj de E, kiom da nacia lingvoj, eĉ kiom da individuoj ! Sed la Fundamento datas de 1905. Tiutempe la kongresanoj ne povis antaŭvidi la ekzisto de LDN, UNO, UNESKO kaj aliaj internacia organizoj. La teksto modifenda estus (p.43/2) :

"Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita de la registaroj de la plej ĉefaj regnoj", ktp... Ĉu ne estas iluzio kredi, ke nacia registaroj, do nacia ŝtatoj, akceptus oficiale E ?

Estas jam tre dubende, hazarde, kredi ke internacia organizoj agnoskus oficiale E. Aliflanke, eĉ se, neatendite, iu registaro leĝus por oficiali E, tio ne estus dezirinda, ĉar tiam E ne plu estus neŭtrala. Ĉu ne estus oportune ke la esperantistaro difinus kiu(j) organizo(j), nepre internacia(j) havus la rajto proponi dezirita ŝanĝoj de la Fundamento ? Se iu grava internacia organizo, ĉu oficiala, ĉu scienca, profesia, ktp, estus preta uzi E, kondiĉe ke la lingvo estu iom ŝanĝota, ĉu la esperantistaro ne estus saĝa akcepti tiuj ŝanĝoj ?

Ĉu ne estas signifa, ke la interkonsento inter Akademio internacia de la Sciencoj (AIS) kaj SAT ne parolas pri E, sed pri L.I. (Internacia Lingvo) ?

Mi alvenas nun al la principo de sufiĉo kaj neceso.

Koncerne la gramatika reguloj oni povas aldoni jena teksto :

Kondiĉe ke la kunteksto tion ebligas sen okazi konfuzo nek dusenco :

- 1) oni evitu uzo de la akuzativo.
- 2) la adjektivoj restu neŝanĝeblaj.
- 3) oni evitu la uzo de la verba sufiksoj.

Almenaŭ komence, oni povus aŭ apliki laŭlitere la nuna Fundamento, aŭ simpli la lingvo, kun pli da atentemo pri la kunteksto.

Tiuj proponoj havas la avantaĝo ŝanĝi nek la vortaroj nek la lernolibroj. Oni nur insistus pri la ebleco sin helpi per la kunteksto por simpli la lingvo.

Mi ne dubas, ke la fundamentistoj ne akceptos miaj ideoj.

Sed kio estas preferinda : ĉu fundamenta E, kiu stagnas, ĉu lingvo kiu, iom malpli balastita, malpli monotona, pli rapide prosperus ?

Mi dezirus koni la reagoj de la legantoj pri miaj proponoj.

REJAL

KOTO kaj KOLO : ĉu sinonimoj ?

Koto kaj kolo diferencas ĉe la tria litero, t por la unua kaj l por la dua. Ili ŝajnas paronimoj, sed ambaŭ vortoj estas samsignifaj en lingvo de iu lando, kie ankaŭ Esperanto estas praktikata.

Antaŭe, en iu vilaĝo de Togolando, neniu knab(in)o rajtis uzi la vorton koto aŭ kolo. Ekzistis objektoj, kiuj tiel nomiĝis. Oni sin demandu, kiujn vortojn uzu la geknaboj, parolantaj pri tiuj objektoj.

Tiam, en ĉiu domo de la vilaĝo estis potoj, en kiuj oni konservis akvon ĉerpitan el putoj. Tiuj potoj ne havis precizan lokon en domoj. Oni povis meti ilin ĉien : antaŭ la dormoĉambron, en la banejon ktp. En la banejo ekzistis speciala poto, en kiun oni metis akvon, per kiu oni sin lavu. Oni uzis kalabaseton por preni iom post iom la akvon el la poto por ĵeti ĝin sur la kapon. Tiel oni sukcesis akvumi la tutan korpon kaj la sinlavado glate devis okazi. La geknaboj devis ĉiumatene plenigi tiujn banujojn, kaj, tion farinte, ili devis informi la gepatrojn pri tio. "Paĉjo, mi jam plenigis je akvo la poton." Kiun poton ? Kiu estas en la banejo. Kiel la geknaboj povis klarigi tion, kiam ekzistas en la banejo multaj potoj, iuj por konservi akvon, unu servanta kiel banujo, kaj aliaj por alia celo ? "Mi metis la akvon en SILEZE-n", devis diri la geknaboj, kaj la gepatroj respondis ridante : "Jen obeemaj kaj ruzaj infanoj. Vi estas inteligentaj. Vi tre bone komprenas, ke estas multaj ZE en la domo. Vi devis nomi SILEZE tiun, en kiun ni metas akvon por lavi nin." (SILE-ZE = sin lavi-poto, tio estas poto, en kiun estas metita akvo por sin lavi ; SILEZE estas ia banujo).

Tagon post tago la kutimoj ŝanĝiĝas. "La nuna mondo estas tute fuŝita. La infanoj estas malobeemaj, uzas kiel ajn ĉiujn vortojn. Dum nia infanaĝo, kiu povis prononci koton aŭ kolon antaŭ plenkreskuloj ? Tiu estu punita per vipado aŭ fastigado far la gepatroj", devis diri maljunulo aŭdanta knabinon uzantan al ŝi malpermesitan vorton.

Esperanto tute malobservas la leĝojn de tiu vilaĝo per siaj vortoj kolo kaj koto, kiujn la tieaj esperantistoj uzas por paroligi maljunulojn. Iam, samideano deklamis poemon verkitan de li. Estis dum la Paska festo, okazinta en tiu vilaĝo. Kutime, dum tiu festo, oni organizas piknikon, kiun ĉiuj homoj junaj kaj maljunaj devas partopreni. La festa etoso estas ĉiam amuza, ĉiuj rakontas anekdotojn por ridigi. La loko, kie la samideano piknikis, estis tute plena je homoj, ĉar ĉiuj muzikoj, manĝaĵoj kaj trinkaĵoj tie abundis. Ĉiuj volis supermezure drinki kaj manĝi. Estis la vespero, kiam sin anoncis la ekfino de la pikniko, tiam ĉiuj vekigis el la dormo kaŭzita de la piknikaĵoj. "Ho, aŭdu, aŭdu la venton siblanta tra la arboj, aŭdu kaj aŭdadu. Ĝi alportas al vi mesaĝon de niaj pra-

mem eliris el la buseto kaj eniris grandan magazemegon. Tie virino mezaĝa kaj bonhumora disdonis taskojn. La mia konsistis el nombri beligaĵtubojn. Tiel mi konatiĝis kun Elisabeth.

Noto : Alian fojon mi pritraktos la temon : ĉu estas inde por instruisto labori por poluciiga kaj neutila internacia beligaĵfirmo, riĉigi laboragentejon, foruzi sian eksterlabortempon por lernado de la apenaŭ prononcebla angla lingvo kaj iel malamiko de Esperanto...

Londono, la 25-an de Februaro

Angla ratatujo

Ĉu vi konas "ratatujon" ? Ĝi estas recepto de la suda Francio. Mi lernis ĝin kuiri kun mia avino kiel instruisto. La recepto konsistas el lardo, oliva oleo, provencaj herboj (tiu miksaĵo el 5 herboj donas apartan guston) kaj legomoj. Tiuj estas laŭmemore paprikofruktoj, kukurbetoj, melongenoj kaj tomatoj. Versajne la recepto varias laŭ la lokoj kaj kuirlibroj. La kuirado estas simpla, oni nur memoru, ke la kuirado devas esti longdaŭra kaj malforta.

Ĉiutage mi tagmanĝas en la entreprena restoracio, kie mi laboras en Londono. Foje aperis "ratatouille" (ratatujo) en la menuaro. Scivoleme (kaj naive) mi iam aliĝis al tiu menuo. Jen kio rezultis el tiu elekto : la aspekto ŝajnis normala, efektive la legomoj estis pli-malpli trafe elektitaj. Male, la odoro tute ne flareblis kaj la gusto estis tiu de legomoj kuiritaj en akvo. La kuiristo intence aŭ neintence forgesis la lardon, la oleon kaj la herbojn.

Mi ne konkludos per komparoj inter diferencaj kuirartoj, parte ĉar mia entreprena restoracio ne respegulas la ĝeneralan manĝo-kutimojn en Anglio, supozeble. Tamen la plendoj kontraŭ la angla kuirarto estas oftaj, sed ni estu singardemaj rilate la onidirojn. Cetere, Londono estas plena je hindaj restoracioj, kie eblas manĝi bonguste, malmultekoste kaj inde...

Londono, la 4-an de marto

"La angloj kuras en la parkoj je dimanĉo malfruvespere..."

Antaŭ kelkaj tagoj, mia amikino informis min pri intereso japana kutimo. Tiu sciigo enkondukis diskuton, kiun mi provu laŭmemore surpaperigi.

Janet - Noel diris al mi, ke junaj japaninoj ekzercas sin al karate-arto en la parkoj je la tagmanĝo kaj ke estas mirinde vidi tiom delikatajn virinojn sin trejni al tiu perforta arto. (Noel estas laboristo en la sama firmo kie Janet kaj mi laboras kaj li havas la econ scii ĉion pri ĉi - ĉefe la onidirojn).

Alex - Ĉu Noel vojaĝis Japanien ?

J. - Ne, sed amiko lia tien iris kaj poste rakontis.

A. - Interese. Ĉu li klarigis kial ili elektas la tagmanĝojn por sin trejni kaj ĉu ili ne kutimas tagmanĝi ?

J. - Ne, tion li ne diris.

A. - Bone, ĉu vi ne pensas, ke la informo estas troiga ? Eble la amiko de Noel foje vidis kelkajn knabinojn karateumi en iu parko je la tagmanĝa tempo. Tamen mi dubas, ĉu tio estas kutimo...

J. - Ĉu vi scias pli bone ol la amiko de Noel pri tio ? Kial vi daŭre pridubas ĉion, kion aŭdas vi ?

A. - Nu, pripensu tiun fantazian anekdoton : Lastdimanĉe mi kuris en la apuda parko kaj jam noktis antaŭ ol mi finkuris. Imagu, ke iu japana turista hazarde rimarkis min kuri je tiu malfrua horo. Li eble rakontos al sia amiko post reveno en Japanion : "Mi vidis anglojn kuri en parko, kiam jam noktis kaj malvarmis" (ne facile videblas, ke mi estas franco). La japana amiko, kiu eble ne bone atentis tiun novaĵon siavice poste rakontos : "La angloj kuras en la parkoj je dimanĉo vespere, kiam noktas kaj eĉ sub la pluvo". Jen kiel kreiga stultaj misinformoj...

Noto : Tamen se japano povas aserti, ke la informo pri karateo kaj japaninoj veras, li aŭ ŝi bonvolu sciigi tion al mi. Mi tiam pardonpetos mian amikino.

Londono, la 12-an de Marto.

Plia atesto kontraŭ la angla...

Mi vivas en Londono de 6 monatoj kun la ĉefa celo lerni la anglan. Eblas nun fari komparon inter la lernado de la angla kaj de Esperanto. Unue necesas diri kelkajn vortojn pri mia lernado de la angla antaŭ mia vojaĝo kaj dum tiuj 6 lastaj monatoj en Londono.

1. Kiam mi adoleskis :

Kiel multaj infanoj, mi lernis la anglan devige en diversaj lernejoj, tio estas - 4 jaroj en mezlernejo, 6 jaroj de pseŭdo-lernado en diversaj teknikaj lernejoj (ni eble forgesu tiujn 6 jarojn por ne troigi la postan konkludon) - 2 lingvaj restadoj en anglaj familioj, respektive 2 semajnoj kiam mi aĝis 14, kaj 3 kiam mi aĝis 15.

2. Strebado kaj rapida seniluziigo dum la 6 lastaj monatoj.

Mi studis la anglan en privata lernejo 2 horojn ĉiusepere kaj 5 vesperojn ĉiusemajne. La pedagogio uzata estis la rekta kaj precipe parola metodo kaj la studentaro tre internacia.

Mi laboras ĉiutage en entrepreno de 6 monatoj kun la angla kiel unusola komunikilo. Tamen, mia laboro tute ne postulis multe da parolado dum la 3 unuaj monatoj. Mia irlanda kunloĝantino alparolas min nur anglalingve kvankam ŝi regas la francan, kaj ni komune aĉetis televidaparaton tiel ke mi kutimiĝu al la "normala" akcento de la ĵurnalistoj kaj prezentistoj.

Nun mi min demandas : kion mi neglektis por pli rapida lernado ? Eble iom malpli da timo kaj pli da kuraĝo alparoli homojn...

Mi aldonas, ke la angla estas taksata kiel facila lingvo por Francoj pro sia vortaro 50-procente latin- aŭ francdevena kaj sia simpla gramatiko. Tiuj du punktoj estas laŭ mi tute pravaj.

Nu jen mia konstato. Mia kompreno parola de la angla estas mizera. Mi komprenas iom pli ol la duonon, kiam angloparantoj uzas la fonetikon de la BBC-prezentistoj, la kvaronon (tio estas malmulte), kiam la parolanto estas skota, sudirlanda, usona kaj fine preskaŭ nenion, kiam ĝi estas nordirlanda. Ĉu mi troigas ? Ne, ĉar ankaŭ la angloparantoj denaskaj ne ĉiam facile interkompreniĝas

kiam ili ne kutimas la akcenton de la alia. Feliĉe mi vivas en Londono, kies loĝantaro estas 50-procente eksterlanda. Kaj en tiu amaso multaj havas komikan akcenton (kiel estas la mia) sed tute kompreneblan. La angla preskaŭ taŭgus kiel internacia lingvo, se ĝi estus parolata de NEdenaskaj angloparolantoj...

Koncerne mian esprimkapablon, prefere mi silentu.

Ĉu mi estas rezistema al la angla ? Verŝajne ne. Multaj konatoj sekvas la saman malrapidan progreson kaj laŭdire unu jaro en Anglio estas la normala tempdaŭro por komuniki en la angla ("komuniki" verŝajne signifas interkompreniĝi pri ĉiutagaj aferoj...)

Mia lernado de Esperanto : Por komuniki laŭ la ci-supra difino, necesis al mi kelkaj horoj semajne dum 5 monatoj kaj 2 internaciaj kunvenoj semajnfinaj.

Nu, ĉu necesas, ke mi konkludu ? Kompreneble, ne!

Nur unu lastan rimarkon mi skribas : Se mi povus kalkuli kiom da horoj mi foruzis en mia studado de la angla kaj kiom da mono tio kostis al la gepatroj kaj la socio, tiuj kvantoj tute certe estus enormaj. Kaj por kiu rezulto ? Male, mia investo mona kaj tempa en la studado de Esperanto estis sensignifa...

~~~~~

## STATO SUPER LA VIVO

### DE L' SENTUMOJ

(aŭ SENSOJ)

Disĉiplo demandas al majstro (antaŭ 3 jarcentoj) : "Majstro, kiel mi povos atingi la supersentuman vivon kaj aŭdi la parolon de Dio ?"

La majstro respondas : "Ĝi estas en vi. Kiam vi kvietigos la penson kaj la volon de vi kaj povos haltigi la radon de l'imagado kaj de l' sentumoj." (Kiam vi silentigos la bruon de la Personeco).

Necesas fari ĝin unu fojon ĉiutage kaj dum mallonga momento ! (Ĝi estas la Memoro pri si!)

Ĉi tio signifas staton, kiu troviĝas super la vivo de l' sentumoj.

Ĉu vi fakte pensis iam kio estas la vivo de l'sentumoj?  
Ĝi estas la ĉiutagaj zorgoj, la prizorgoj, la ĉiutagaj kontaktoj, ĉio, kion oni vidas kaj aŭdas, ktp., tra la sentumoj. Oni vidas, ke ne estas sufiĉe da manĝaĵo, aŭ ke la kaseroloj kaj potoj estas eluzitaj, aŭ ke oni maltrafis la (kolektivajn) aŭtobuson, ktp.; ĉio ĉi tio estas la vivo de l' sentumoj.

Oni vidas la militon, la monon, ke la tablo estas rompita, leteron kun malbona novaĵo, malsanon, tertremojn, sian propran vizaĝon ! Ĉio ĉi tio estas sensa, sentuma vivo, transsendata de la sensoj aŭ sentumoj.

Kiom da fojoj ni sentis nin malkvietaj ĉar la elektra lumo misfunkciis, aŭ kaŭze de alia homo, aŭ ĉar ni ne povis aĉeti kion ni deziris. Jen la vivo spertebla tra la 5 sentumoj.

Ĉu estas alia vivo ekster miaj negocoj, ekster mia laboro, ekster miaj ĉiutagaj zorgoj, ekster mia hejmo, mia familio, mia malsana filo, ktp. ?

La Esoterismo parolas pri alia vivo.

Tamen, regataj de la sentuma realo (kiu sklaavigas nin), ni ne facile vidas trans la partikulara cirkonstanco, kiu trudas sian influon super ni en determinita momento, kiel ekzemple, kiam ni perdis nian bileton aŭ nian monujon aŭ ni spertis la krudecon de iu por ni. Kiam ni estis kaptitaj de partikulara evento ekstera, ĉio ŝajnas esti tiu evento. Ĉu ne vere ? Kion ni devas fari ?

Memori pri ni mem !

En libro de sufia\* skolo de antaŭ 8 jarcentoj oni diras: La Memoro pri si estas komparata je alsupro al la mara surfaco kaj je la enspiro de aero. "Ĉi tiu aero - ĝi diras - estas mirakla, kaj daŭras tutan tagon, eĉ se oni estas en la oceana fundo!"

\* SUFIA : Mistika aŭ derviŝa (p.p. mahomedismo).

SUFIIISMO : (el persa origino) Mistika-derviŝa-esotera skolo de mahomedismo.

DERVIŜOJ : Fratularo de almozpetaj asketoj mahomedanaj, kiuj uzas rimarkindajn teknikojn de dancoj kaj ekstazo, kies celo estas la unuiĝo al Dio.

(El Komentoj psikologiaj al la verkoj de GURDIEFO-USPENKO, fare de D-ro Maŭrico NIKOLO, Vol.1)

Resumtradukis ERGOTO DE BONAERO

Paco, Paco, nun estiĝu  
Por ke la homoj rehomigu !  
R. Becher

## AL JUNA KNABO

Infano aminda,  
Kiu malfermas la okulojn sur la mondo,  
Ignoru la kruelajn aktualaĵojn,  
Se ci ne deziras hurli pro teruro.  
Ci havas ankoraŭ la tempon  
Por malkovri la abomenaĵojn de la milito.  
Ignoru la ekzistadon de tiuj infanoj,  
Kiu besto vivas en keloj por protekti sin  
Kontraŭ la ĉiutagaj obusoj,  
Kiu ne plu povas vidi la ĉielon,  
Admiri la gracion de papilio,  
Kiu eĉ ne plu scipovas ludi  
Tiom la timego premas ilian koron.  
Ignoru tiujn nekredeblajn eventojn  
Se ci ne deziras plori pro malespero.

Infano aminda,  
Semu florojn kaj rikoltu la lumon ;  
Promenu en la lazuro de ciaz revoj.  
Dancu kun la princino de l' arbaro,  
Malsovaĝigu la vulpon kaj  
Respondecu pri cia rozo.  
Aŭdigu al la tuta mondo  
Cian ridon, kiu portas en siaj mil splitoj  
Ĉiujn vojaĝojn, ĉiujn ŝlosilojn.

Infano aminda,  
Malpeza kiel fontakvo,  
Bela kiel sunleviĝo,  
Per cia pureco, animfreŝeco, malavareco,  
Gvidu la homojn al la vojo de l' paco...

Michèle FREUD.

**Edgard JAMART :**

Feliĉoj kaj malfeliĉoj de l'kristanismo  
(laŭ kaj el la verko "**Mil jaroj de kristana filozofio**"  
de Evaldo PAULI)

daŭrigo de L! 82

### 3.

Asertas informo de Luko, ke Paŭlo havis vizion pri Jesuo, kaj tial li iĝis kristano, reveninte tuj al Tarso. Sciinte, ke en Antioko formiĝis grupo da baptistaj kristanoj, la apostoloj de Jerusalemo tien sendis Barnabon, erudician homon. Kaj li, de Antioko, iris al Tarso, reprenante Paŭlon por organizi la eklezion de Antioko. Tio okazis ĉ. la jaro 40. La signifo de tiu ĉi siria urbo de grekaj parolantoj kaj la kreskanta movado de sekvantoj de Jesuo, kiuj nomis lin greke la "Kristos" (la oleita), kreis definitive la nomon de la kristanismo. Ĉi tie Paŭlo predikis dum kvin jaroj. Poste, de tempo al tempo li faris grandajn vojaĝojn eksterlanden, al Malgranda Azio, al Grekio kaj Ateno, fine ĝis Romo. Dum tiuj vojaĝoj li laboris kiel teksisto de artefaritaĵoj, por vivteni sin, kaj de iu loko al aliaj sendis leterojn (konatajn kiel la "Epistoloj de Paŭlo"). Je la dua vojaĝo eksterlanden, li paroladis en la Aeropago de Ateno, kie li parolis pri la releviĝo de Jesuo kaj de la mortintoj. Jen la rezulto, laŭ Luko : "Kaj aŭdinte pri releviĝo de la mortintoj, iuj mokis; sed aliaj diris : ni aŭskultos vin denove pri tio. Kaj tie! Paŭlo eliris el inter ili. Sed iuj viroj aliĝis al li kaj kredis, inter kiuj estis Dionizio, Aeropagano.... (La Agoj 17, 32-34).

Kvincent jarojn poste, iu filozofo, oni ne scias ĉu monako, ĉu episkopo, verkis tre bonajn traktaĵojn pri filozofio kaj teologio, kun la nomo de tiu Dionizio Aeropagano. La tuta Mezepoko kredis pri tiu falsa Dionizio, kiun oni hodiaŭ mencias per Pseŭdo-Dionizio. La vera Dionizio estas konata nur per la mencio de Luko kaj eble nenion verkis.

Cetere, Paŭlo ne favoris la egalecon de viroj kaj virinoj. La edzino uzu vualon kiel submetiĝon al sia edzo, kaj en la preĝejo ŝi ne alparolu al la publiko. La viro ne devas

havi la kapon vualita, pro tio ke li estas la bildo kaj la gloro de Dio.

Apostolo Paŭlo proponas la eksedziĝon, sed nur kiam iu el la geedzoj ne akceptas la kristaniĝon de la alia. Tiu agnosko de la divorco nur pro motivo ekstera al la familio havas aspekton de religia fanatikismo, konsidere ke li ne akceptas ĝin pro internaj motivoj. Tiu forlaso de la familio pro religiaj motivoj estis en la bazo de ĉiuj unuaj disĉiploj de Jesuo; ekde Apostolo Petro, multaj kristanoj lasis sian edzinon por prediki la novan kredon pri la savo.

\*

Johano la Evangeliiisto, por difini la kristanan koncepton pri la dia naturo de Jesuo, trafe uzis la vorton "Logoso" (greke Logos), tre oftan en la greka filozofio. Li uzas eĉ la grekan esprimon : "Kaj la Logoso fariĝis karno kaj loĝis inter ni, kaj ni vidis lian gloron, gloron kvazaŭ de la solenaskita de la patro, plena de graco kaj vero" (Johano 1, 14).

La neoplatonismo naskiĝis en platonaj kaj neopitagorismaj rondoj de Aleksandrio je la unua jarcento antaŭ K. Ĉar la kleraj judoj apartenis al tiu rondo, estas facile ankaŭ kompreni, ke tiu maniero paroli pri "Logoso" povis facile eniri fine en la kristanajn rondojn.

Fine, oni devas demandi, ĉu la homoj devas kredi tion, kion Johano asertis. Liaj bazaj asertoj estas : ekzistas la Logoso, per kiu ĉio estis kreita, kaj tiu Logoso enkarniĝis en Jesuo.

Por la kristanoj, la problemo de kredo estas teologia, ĉar ili akceptas la asertojn de Johano kiel revelaciitajn. Sed por tiuj, kiuj ne akceptas la revelacion, la asertoj de Johano estas granda stultaĵo, kaj pri kiuj li ne havas iun ajn pruvon, ĉar li nur asertas.

Pro la transcendeco de Dio, la tuta afero pri la Triunuo restas malfacila diskutado. Jen disputo, kiu ankoraŭ ne ĉesis inter teologoj kaj filozofoj. Ene de la kristanismo mem, la antikvaj arianoj kaj la modernaj unitarianoj ne akceptas la Triunuon. Proksime de la kristanismo, ankaŭ la islamanoj ne akceptas ĝin.

4

Aristobulo vivis en Aleksandrio inter 200 kaj 100 a.K.

Oni konsideras lin kiel la plej malnovan judan filozofon en tiu urbo. Li asertis, ke la helena filozofio dependas de la juda revelacio.

Sankta Justeno (ĉ.100-166) estas tipa kristana filozofo en la sama linio de la neoplatonismo, kaj li ripetas la asertojn de la judaj filozoj: "Platono prunte lernis de profeto Moseo" kaj: "Ne estas ni, kiuj pensas kiel la aliaj, sed estas la aliaj, kiuj imitas niajn doktrinojn". Li respondas al la pagana respondo, kial la kristanoj prefere ne mortigus sin por pli frue unuiĝi kun Dio; li klarigas, kial Dio toleras le persekutintojn. Li pledas ĉe la Imperiestro Marko-Aŭrelio la respekton al la kristanoj, sed atingos fine, per la martireco, la premion de la vero, kiun li predikis. Marko-Aŭrelio malhelpis la eniron de novaj religioj en 176 kaj agis malamike koncerne la kristanisman.

Justeno skribis pri la absoluta dogmaro:

"Mi diras, ke estas senmortaj nur tiuj, kiuj alproksimiĝas de Dio pere de la sankteco kaj virto; kiuj vivas maljuste, kaj ne konvertiĝas, tiuj, ni kredas, estos punataj en la eterna fajro". "Dio indikis al la tuta homaro tion, kio estas eterne kaj absolute justa, tutan la justecon; neniunesciu, ke la adultado estas malbono, kaj same la prostituo, la mortigado, kaj tiuspecaj aferoj; kaj ke, dum li faras tion, ne sciu pri tiu malicaĵo, escepte de tiuj, kiuj estas plenaj de la malpura spirito, difekta edukado, malbonaj moroj, eraraj leĝoj, pro kio li forlasis la naturajn nociojn, aŭ estingis ilin, aŭ subpremis ilin. La pruvo estas en tio, ke tiuj homoj ne volas suferi tion, kion ili faras al la aliaj; kaj en tio, ke la konscio de tiuj riproĉas ilin mem."

\*

Taciano naskiĝis ĉirkaŭ j.120; li fariĝis kristana, eble en Romo, kie li aŭdis lekcionojn de sankta Justeno. Tie li mem kreis lernejon. Rigida en moralaj aferoj, li eniris la sekton de la "enkratismo" (el la greka "enkrateia" = moderigo, sindeteno), kiu interpretas la geedziĝon kiel malĉastajon. Li parolis pri la pli granda antikveco de Moseo koncerne la grekajn filozofojn.

\*

Atenagoro vivis en la tempo de Marko-Aŭrelio. Rekte pri Atenagoro oni scias preskaŭ nur tion, kio estas enten-

ata en la titolo mem de lia ĉefa verko "Petego de la kristana filozofo Atenagoro el Ateno favore al la kristanoj" direktita al la imperiestroj Aŭrelio kaj Komodo por forpuŝi ĉiajn akuzojn.

Pri la akuzo je ateismo, li diras en kontraŭo, ke la kristanoj adoras Dion, ununuran, kvankam Patro, Filo kaj Sankta Spirito; ke la kristanoj ne oferas sangoferojn, ĉar al Dio plaĉas nur spiritaj oferoj; ke ili ne honoras la paganajn diojn, ĉar tiuj supozaj dioj ne estas indaj je kulto, kaj ĉar ili estas nenio ol kreitaĵoj, kaj la mirakloj al ili atribuataj estas verko de la demono.

Pri la akuzo je malmoraleco, Atenagoro kontraŭasertas, ke la kristanoj malkonsentas eĉ la malbonajn pensojn, pro timo ofendi Dion; ke ili observas la ĉastecon en la geedziĝo, kaj ke la dua geedziĝo estas por ili deca adulto, ke la paganoj estas la kulpuloj de tiuj malordoj; ke la malvirto akuzas la virton, laŭ la proverbo.

Pri la akuzo je antropofagismo, Atenagoro asertas, ke la kristanoj estas pli respektemaj koncerne la vivon de la personoj ol la paganoj, ĉar ili fuĝas de la cirkoludoj kaj malaprobas la forlason de infanoj; cetere, ke la kristana kredo en la reviviĝo avertas ilin kontraŭ tiaj ekscesoj.

\*

La unuaj Papoj jam uzis ekskomunikon.

Sankta Ireneo, kiu naskiĝis eble en Smirno, Malgranda Azio, en 135, estis en Liono kiel pastro en 177, antaŭ ol fariĝi episkopo. Ireneo portis al Romo leteron al Papo favore al la episkopo de Efezo, tiutempe ekskomunikita, ĉar li ne akordis pri la nova dato de paskofesto.

La ĉefa verko de Ireneo titoliĝas "Ekspono kaj refuto de la falsa kono", kontraŭ la gnostikulojn.

Tiuj ĉi dividis la homojn en multajn nivelojn, el kiuj la plej malaltaj - la psikuloj kaj materiuloj - estus malpli liberaj. Malfavore al tiu temo, Ireneo defendas la libercon. Li avertas, ke la inteligenta estaĵo estas libera estaĵo. Li rezonas jene: "La vere racia homo, kaj laŭ tio simila al Dio, estis farita libera en sia arbitro kaj sia povo".

Ĉarma estas lia jena metaforo: Kiam la korpo mortas, la animo konservas la korpan figuron de la homo, kiel la glaciĝinta akvo de iu vitra vazo restas tiel post la frakaso de la vitro".

(Daŭrigota).

# Pan de la Arbaro

Kara mia virineto, - permesu, ke mi diru al vi kara! - vi ne povas imagi kiom bonŝanca mi estas nun, nun kiam vi skribas al mi, ke Pan de la Arbaro estas via amanto jam de la jaro..., nome de antaŭ mia konatiĝo kun li.

Jes, mi estas bonŝanca, ĉar la mensogulo, la sentaŭgulo, la trompanto restas al vi, ne al mi! Via skribaĵo ne estis fulmotondro, mi ja sciis, ke vi ekzistas, ĉar mi estis gastino de Pan, kiam iun tagon, antaŭ mia reenlandiĝo mi trovis lian nesenditan leteron al vi. Mi tamen volis esperi pri aventuro, pri io neserioza. Fakte lia konduto estis stranga. Ofte li malaperis por kelkaj tagoj sen averto. Mi tuj ne sciis tiam, ke li venadis al vi, ke li amindumis kun vi, malgraŭ siaj amaj promesoj al mi.

Ĉu mi pravas taksante min bonŝanca? La sentaŭgulo restas al vi; mi povas forkuri de la rememoroj; mi povas min liberigi de la angoro.

Sed estis tempo, kiam mi preskaŭ mortis pro la doloro. Mi ŝtoniĝis trovante tiun leteron. Ho, kiom mi suferis! Mi suferis ĉion, kion oni povas suferi en similaj cirkonstancoj, precipe pro la kruelaj malfacilaĵoj, kiuj malebligis mian reveturon al li kaj, se necesus, la batalon kontraŭ vi. Dum mia malproksimeco en fora lando, mi vivis de rememoroj kaj de esperoj, malgraŭ via ekzisto, per kompato al mi. Mi ne volis vidi la realon, mi kovris miajn okulojn kaj ŝtopis miajn orelojn kriante: "Ŝi estas momenta, aventura rilato! Li amas min, min, min!"... Mi serĉadis ĉiun pretekston por pravigi lin, ĉiun rimedon por iluzii min. Mi volis kredi, ke nur la malsano, la malfacilaĵoj, la familiaj ĉagrenoj estis la kaŭzo de la ofta silento. Sed via letero kun via sukribado, post pli ol du jaroj de kiam via nomo aperis la unuan fojon antaŭ miaj okuloj, en mia konscio, abrupte ŝiris la vindon. Kaj mi miris, ke mi eĉ ne tremis. Ne okazis al mi, kio okazas kiam oni ekscias ion, tute ne suspektan. Jen la malsimileco: mi ne kredis je li, mi volis kredi. Kaj jen la rezulto: kiam fine via letero venis al mi kaj mi devis legi ĝin, mi ne falis, sed mi leviĝis, ĉar mi liberigis min de la pezo de la angoro, de la teruro de la vero. Okazis al mi same kiel kiam oni havas absceson plenplenan

de puso sur iu parto de la korpo kaj ne kuraĝas tuŝi ĝin timante pli intensan suferon, ĉar oni taksas sin ne kapabla elteni plian korpan doloron. Sed post kiam la absceso krevos aŭ la kuracisto faras tranĉon en ĝi, oni ĝuas la liberigon. Jes, via letero estis la tranĉilo, pro kio elfluas la puso, pro kio mi povas spiri plenpulme. Nun, korpe kaj anime, mi sentas min pli bone. Mi timas nenion, ĉar fine mi havas la verecon en mi, sen vualoj. Mi kuraĝe alfrontas ĝin, ĉar mi konas la veran animon de Pan: ĝi estas pli putra ol la puso de la absceso. Pan havas nur verkistan talenton, ne koron. Antaŭ la ricevo de via letero, mi estis dirinta al iu amiko, preskaŭ testamente: "Mi mortos pro li, rememoru!". Male, mi nun meditas: "Mi certe ne mortos por sentaŭgulo".

Sciu, mi ŝparis dum du jaroj sufiĉe da mono, por ke li vidu mian landon kun mi. Mia lando povus esti la fonto kaj la forĝejo de novaj ideoj. Mi ŝparis monon, por ke, kiam li venos al mi, mi ne estu ligita al la laboro dum kelka tempo. Tiel estus ebleco al mi ĝui la tempon sen mankoj. Ho, jes, mi ŝparis monon por ĝui ĝin kune. Li pli ol unu fojon parolis al mi pri monaj malfacilaĵoj. Mi invitis lin al mi. Mi diris, ke ĉe mi estas ĉio. Sufiĉas ke li sidu kaj verku. Li mem gajnos per sia oreca kapo kaj estos sendependa. Li ne venis malgraŭ promesoj. Ĉiam li promesis.

Monon mi ne sendis, kvankam mi emis. Mi volis, ke mian monon li ĝuu kun mi, ne kun aliaj, eventuale kun vi. Ne plaĉis al mi la penso, ke vi ambaŭ povus trinki je mia sano. Pli plaĉas al mi trinki je la via.

Vi eble ne kredas, ke mi sciis pri via ekzisto. Sed mi povas sendubigi vin pri la vereco de miaj asertoj pere de la fotokopio de la menciita letero. La dato estas ege signifa: 14an de aŭgusto. Tiun nokton li venis en la vagonaron renkonte al mi. Ĉu dum la lato li haltis ĉe vi, pro kio li ne sendis la leteron?


Jes, mi amis Pan, mi amegis lin, ĉar li kapablas tiel bele, tiel varme mensogi, kun mieno naiva kaj senespera. Li tute ne suspektis, ke mi sciis pri la ekzisto de la virineto en la urbo. Sed kiam li donis lastatempe, kiel propran, la numeron de la leterkesto en la poŝtofiĉejo, mi ne kontrolis tiun numeron kun la numero de la letero, tiel bone mi rememoris ĝin. Fine vi mem alvenis al mi per

via letero. Mi ne estas kontraŭ vi, ĉar se vi amas lin, kompreneble vi defendas vian amon. Kaj vi rajtas ĝin defendi. Tamen kiel aĉe, kiel maldelikate, kiel stulte vi skribis al mi! Guste kiel virineto. Do, se Pan preferas vin, se li tenas vin, tio signifas, ke li ne scias taksii aŭ aspiri al iu aŭ al io pli valora. Tio signifas, ke li meritas vin, kaj nenion, nenion alian: nur vin! Nun mi ridas konsciante, ke malgraŭ ĉio, ne nur mi sed ankaŭ vi estis trompitaĵ! Kaj meditu: eĉ se li estas via edzo, li trovas ĉiam rimedon por trompadi vin.

Vi komencis la leteron dirante: mi estas Elsa Sablo. Bone, mi estas Mila Malen, verkistino, tre valora (laŭ la diroj aŭ laŭ la flatoj) kaj fama (sendube). Li estas verkisto tre valora (sendube) kaj senfama (certe). Li eble pensis ke pere de mi li fariĝos... fama... Li pravis. Fakte mi trovis eldoniston por lia poemaro. La verko aperis sed Pan ne vidos ĝin, aŭ almenaŭ li ne vidos ĝin pere de mi. Li aĉetu ktola libron ie ajn. Vane Pan ludis kun mi. Alia punkto: mi konkursigis lin plurajn fojojn kaj preskaŭ ĉiam li gajnis premion. En mia studejo troviĝas arĝentumita pokalo, medalo kaj diplomoj. Mi ĝis nun konservis ilin por li, sed la nomo de la gajninto ne aperas. Mi ankaŭ gajnis pokalojn, medalojn kaj diplomojn sen mia nomo. Pro tio mi povas diri ke ĉion gajnis mi. Kaj mi povas konkludi, ke Pan kontribuis al mia fameco. Mi rajtas teni ĉion por mi, se li uzis mian amon por sia avantaĝo. Kiu sendis la konkursiĝojn? Kiu pagis la kotizojn? Kiu vojaĝis al la ceremonioj? MI, nek VI, nek LI, nur MI!

La epilogo do ne estas tre nigra, se mi fine havis iom da gajno post tiom da sufero. Kiam mi rigardas la longan vicon de premioj, mi vere povas kredi ke ĉio estas mia, ĉar iamaniere, ĉio estas mia. Cio alvenis al mi pere de mia agemo kaj de mia bona volo (sed mi strebis ke Pan venos kaj prenos ĉion). Male, al vi restas nur la sentaŭgulo. Vi nenion faris por li, por ke li ne estu en malfacilaĵoj, por ke li ne petu helpon al mi. Li havas talenton por verki, nenion alian. Ja la talento por verki estas bono, sed por li, ne por vi. Vi ne taŭgas por lia verkista talento. Per vi li ne progresos. Li ripetiĝos ĝis la banalo, ĝis la naŭzo. Ho, tio ne gravas por Elsa Sablo, ĉar nur virineto. Li kaj vi ne konscias pri la pereco. Tio estas la puno. Estu sanaj!

Lina Gabrielli.



Bernard AUNIS :

## GRAVA ŜANĜO EN LA SINTENO DE S.A.T.

Kion vi opinius, se s-ro Borĉoviĉ, prezidanto de la Vegetarana Asocio Tutmonda, deklarus kun la aprobo de la tuta movada estraro, ke, antaŭ ol oni revu pri sendianda manĝo, estas necese helpi la konsumadon de bestaĵo, kaj se li rifuzus la rajton paroli al la partianoj de la vegetarismo? Versajne vi opinius, ke la tuta afero okazis en frenezulejo; nu, la Plenum-Komitato de la Sennacieca Asocio Tutmonda ĵus sciigis en la numero 82a de **Laŭte!**, ke ĝi rezignis pri la sennacieca batalo kaj aprobas la luktojn de la "koloniitaj popoloj". Ni rimarku, ke ĝi singardeme preferas ne precizigi kun ekzakteco, kiuj estas tiuj koloniitaj popoloj; efektive, ĝi citas Nov-Kaledonion, Gibraltaron, Namibion kaj aldonas hipokritan paron da ktp. Tiuj "ktp" estas tre utilaj por la malhonestaj homoj, kiuj preferas kaŝi sian intencon, sed ili ne povas kontentigi sciemman leganton.

Mi tre dezirus, ke la Plenum-Komitatoj montru sian kompletan penson kaj publikigu la kompletan liston de la malkoloniindaj landoj. Tio estus ege interesa: Nov-Zelando kaj Nov-Kaledonio, ekzemple, estas ekzakte en la sama kazo, krom tiun eta diferenco, ke en la unua lando la blankuloj mortigis pli da praloĝantoj kaj estas nun la granda plimulto. Cetere, ankaŭ la Maorioj nun postulas sendependiĝon kaj foriron de la blankuloj. Kion opinias la Plenum-Komitato tiurilate? Kian solvon ĝi proponas?

Ankaŭ Egiptujo povus esti malkoloniita: oni scias, ke la Koptoj vivis tie antaŭ la invado de la Araboj kaj estas nun persekutata minoritato; ankaŭ tie la sinteno de la Plenum-Komitato estus interesa. En **Sennaciulo** oni ploradis pri la sorto de la kompatindaj Tataroj, kiuj estis el-



pelitaj de Stalino el la lando, kiu estis nekontesteble ilia propraĵo, ĉar ili konkeris ĝin en la 13a jarcento, mortigante la antaŭan loĝantaron. Oni klarigu al ni, en kio la murdadoj de la 13a jarcento estis aprobindaj, kaj en kio la elpelo de la 20a jarcento estis aĉa krimo.

Okaze de la Graz-a Konferenco en 1987 mi turismis en Aŭstrujo, kaj oni parolis al mi pri la oprimitaj Slovenoj de Karintio; sed, kiam mi vizitis muzeojn, mi sciigis, ke la unuaj loĝantoj de la regiono estis nek Germanoj, nek Slavoj, sed Keltoj; tiuj Keltoj estis submetitaj de Romio sed ne malaperis tiam; tamen en la 6a jarcento Slavoj invadis Karintion, murdis ĉiujn Keltojn kaj instaligis ilialoke. Iom poste la Sankta Romia-Germana Imperio, kiu rigardis sin legitima heredanto de Romio, reprenis tiun regionon, pri kiu ĝi neniam rezignis. Ili tamen ne murdis la Slavojn kaj nur submetis ilin. Bonvolu la Plenum-Komitatoj klarigi, al kiuj apartenas juste Karintio.

Mi dubas tamen, ke tiuj estimindaj homoj konsentos iam pravigi sin: se kredi ilian "respondon", ili havas la aprobon de la plejparto de la SAT-anoj; alidire tiu plejparto kontentigas aŭdante la vorton "ktp" kaj rigardas ĝin sufiĉa pruvo. Ne estas do necese, ke iliaj ĉefoj estu pli inteligentaj ol ili.

**Oksana :**

Kio estas progreso ?

Dankon al s-ro Deker pro la respondo en "Laŭte!"-81. En tiu respondo estas tuŝita tre grava problemo, nome: "la teknika kaj scienca progreso kiel la supera celo de la homaro". Sed komence - kelkaj simplaj respondoj. Por ke ne plu okazu miskompreno - jen kelkaj biografiaĵoj. En "Lingvo diktas" mi diris: "Mi multege admiras tiujn kapablulojn, kiuj ne nur scipovas flue legi en fremda lingvo, sed ankaŭ pensi en ĝi". Mi renkontis multajn homojn, scipovantajn diversajn lingvojn, kaj mi scias ke eblas atingi diversajn gradojn de posedo de fremda lingvo. Kaj tamen: poliglotoj ne tro abundas. Plejmulto havas problemojn (iuj pli, aliaj malpli) kun fremdaj lingvoj. Lerni Esperanton estas multe pli facile ol ajnan nacian lingvon - jen la plej banala

aserto, kaj mia propra sperto diras ke tiel estas. Mi lernis Esperanton en 1973, tiam 15-jara, do jam delonge mi senprobleme pensas en Esperanto. Kaj kompreneble mi ne skribas mian leteron al vi en la ukraina kaj ne tradukas ĝin en Esperanton poste (krome - pri kalkulado en Esp-o mi neniam sentis ian problemon, tial tuj mirigis min la datoj pri Nabokov en via respondo. Petolis preskoboldoj, ĉu?). Sed mi ne konsideras Esperanton "fremda lingvo" - jen la tuto! Ĝi estas mia dua lingvo, kiun mi ne metas sur la saman liston kun ekzemple la franca aŭ l'angla.

Sed - pri gravaj problemoj. Bedaŭrinde, nia diskutado ankoraŭ staras ĉe sia komenco. Kial bedaŭrinde? - ĉar kioman fojon mi estas de vigita ripeti: kara sinjoro, Sovetio ne estas "granda nacio", ĝi estas ŝtato en kiu vivas multaj nacioj. Ĉu vere tia simpla fakto estas tiom malfacile komprenebla? Mi ne apartenas al admirantoj de "forta Sovetio" nek de "forta Usono". Mi pensas ke la homaro estus pli feliĉa se tiuj du supergrandaj ŝtatoj estus malpli fortaj (ĉefe se ili havus malpli da rakedoj ktp.) Sed ankaŭ la fortecon de Sovetio mi pridubas. Ŝajnas al mi ke vi trotaksas kapablon de Sovetio "antaŭenirigi la sciencojn kaj la progreson". Pri kia progreso temas? Ke Sovetio, kiel vasta imperio, posedas "vastajn spacojn" kaj "abundon de krudmaterialo" estas vero. Sed kion vi nomas "progreso"? Se sub tiu vorto "progreso" kaŝiĝas nombroj - jes, granda progreso! Sovetiaj oficialuloj tre ŝatas prezenti grandiozajn nombrojn: tiom da tunoj da ŝtalo, tiom da litroj da nafto, tiom da kubaj metroj da gaso ktp. ktp. Sed, estimataj admirantoj de brilaj nombroj, ne sufiĉas interesiĝi kiom longas la Blankmara kanalo kaj dum kiom da monatoj oni konstruis ĝin - necesas interesiĝi ankaŭ pri kiom da miloj da malliberuloj pereis dum ĝia konstruo. Necesas demandi pri kostoj (en homaj vivoj) de simila teknika progreso! Ankaŭ en antikva Egiptio sklavoj konstruis grandiozajn piramidojn. Venas en la kapon publika parolado de ukraina literatura kritikisto Ivan Džuba, kiun li faris dum la 25-a datreveno de la tragedio en Babin Jar (loko en Kievo, kie nazioj dum la dua mondmilito mortpafis milojn da judoj kaj alinacianoj). Jen citaĵo el tiu fama parolado (1966-a jaro) :

"Sed ne necesas forgesi, ke faŝismo komenciĝas ne en Babin Jar kaj ne per ĝi finiĝas. Faŝismo komenciĝas per malestimo de homo, sed finiĝas per ekstermo de homo, ekstermo de popoloj - sed ne nepre per tia ekstermo, kiel en Babin Jar".

Ni imagu por unu momento, ke Hitler venkis, germana faŝismo venkis. Ni povas ne dubi, ke ĝi kreus brilan kaj "florantan" socion, kiu atingus altan mastruman kaj teknikan nivelon, ĝi konus ĉiujn tiujn sciencajn kaj aliajn mal-kovrojn, kiujn ni konas nun. Kaj sendube la mutaj sklavoj de faŝismo sukcesus "konkeri" ankaŭ la kosmon kaj ili flugus al aliaj planedoj reprezentitaj tie homaron kaj la teran civilizacion. Kaj tiu reĝimo farus ĉion eblan, por establi sian "veron", por ke homoj forgesu, per kia prezo estis aĉetita tiu "progreso", ke historio pravigu ilin aŭ almenaŭ forgesu multegajn krimojn, ke malhumana socio ŝajnu al homoj normala kaj eĉ la plej bona sur la Tero...

**Tial ni devas juĝi pri tiu aŭ alia socio ne laŭ ĝiaj eksteraj teknikaj atingoj, sed laŭ tio, en kiu loko staras kaj kion signifas en ĝi homo, kiel oni taksas en ĝi homan dignon kaj homan konsciencon".**

Laŭ mia opinio, tiel oni taksu sociojn - ne laŭ nuraj teknikaj atingoj. Ankaŭ sklavoj povas flugi en la kosmon! Kial Sovetio post displitiĝo devus reveni al mezepoko?? Cetere - laŭ multaj kriterioj ĝi dum 70 jaroj de sia ekzisto troviĝis tie. Kiel dum la plej mallumaj jaroj de la mezepoko oni bruligis librojn en Sovetio, ĵetis alipensantojn en prizonojn kaj psikiatrejojn (jen la nova trajto! sed ankaŭ en la 19-a jarcento la caro proklamis rusan poeton Ĉaadajev "freneza", ĉar ne plaĉis al la caro la kritiko de lia reĝimo...), proklamis ke ekzistas nur "unusola vera instruo en la mondo - marksismo - leninismo - (stalinismo)" ktp. Ĉu tio ne memorigas al vi mezepokon?? Antaŭ la dua mondmilito Estonio, Latvio, Litovio estis sendependaj ŝtatoj kaj **sen latino** ili sukcesis komerci kun cetera mondo, kial do ili ne kapablu tion nun??? Kompreneble, tiuj al kiuj ne plaĉas disfaloj de imperioj ĉiam trovas multege da faktoj por diri: "Vidu, kio okazas - ili nur buĉas unu l'alian". Cetere - ĝuste tion ripetas nun sovetaj novstalinistoj: "Estis Stalin - estis ordo" kaj sopiras novan Stalinon.

Sed se vi interesiĝus pli proksime pri ekzemple programoj de Popolaj frontoj en Ĉebaltio, vi trovos tie multon interesan. Ĝus mi studis la programon de la Popola Fronto de Latvio kaj komprenas nun pli klare kial tiel furiozas kampanjo kontraŭ ĝi. Ĝi havas multajn gravajn punktojn, inter ili jenan:

"Popola Fronto de Latvio postulas agnoski la krimojn de stalinisma reĝimo kontraŭ nacioj de Latvio de 1937 ĝis 1953 kiel **krimoj kontraŭ homaro**, publikigi nomojn de organizintoj kaj aktivaj plenumantoj de ĉi tiuj kaj aliaj reprezalioj de stalinismo. Senigi kulpulojn de privilegioj kaj ŝtataj dekoraĵoj kaj starigi ilin antaŭ juraj instancoj."

Ĉu necesas klarigi kiu en nuna momento plej laŭte krias pri "danĝeraj latvaj naciistoj"?

La programo cetere enhavas ankaŭ postulojn forigi militistan instruadon en mezlernejoj (ĉar en sovetaj lernejoj estas tia studobjekto: "militista preparado" - ĉu en nuna epoko de "perestrojko" ĝi estos forigota?), ĝi proponas ankaŭ jenon: "Permesi al homoj, kies religiaj aŭ pacifistaj konvinkoj ne permesas al ili soldatservi... labori la saman periodon en popola mastrumado". Ĉu eble tio ne estas bonaj proponoj? Sed certe ĉagrenos vin la pret-eco de PFL helpi al ĉiuj nacioj de Latvio en iliaj kulturaj streboj, ĉar laŭ vi tio estas nur "bedaŭrinda modo". Ĉu vere la homaro bezonas nur aŭtomobilojn, komputilojn kaj aliajn teknikaĵojn? Jen la nova idolo, kaj ne gravas kiupreze... Ĉu?

L.A.:

### PRI KORSIKIO

Nuntempe estas gravaj okazintaĵoj en Korsikio. Multaj homoj, eĉ maldekstruloj, ne volas vidi, ke Korsikio pli ol aliaj francaj etnaj regionoj suferas kolonian (aŭ post-kolonian) situacion.

Post la konkerado leĝo trudis, ke ĉiuj produktoj elirantaj el Korsikio alvenu je kontinenta (franca) haveno kaj pro leĝo de jaro 1848 la korsikaj produktoj devis pagi (en kontinenta Francio) doganajn impostojn same kiel eksterlandaj produktoj. Sed la produktoj francdevenaj eniris libere en Korsikion.

Kaj tio daŭris ĝis j.1913 !

Pri tiu dua afero, kvankam tiu leĝo ne plu ekzistas nun, oni bone komprenas, ke la efiko pri ekonomio daŭras.

Pri la unua, la malbonoj estas duoblaj. Ne nur dum pli ol unu jarcento tiu leĝo havis malbonan efikon ekonomie, sed ĝi nun kvankam ne plu leĝe daŭras fakte. Do la malbono restas.

Ekzemple, por vojaĝi malproksime elde Korsikio necesas ekvojaĝi al kontinenta Francio, eĉ se oni iras en alia direkto.

Dume, de Sardinio oni povas iri rekte al Tunizo, Barcelono, kompreneble al ĉiu parto de Italio kaj verŝajne al multaj aliaj landoj, ĉefe mediteraneaj. Tio aplikiĝas kvazaŭ egale por homoj aŭ varoj, por mar- aŭ aer-trafiko.

95 procentoj de la nutraj varoj alvenas de la kontinento (t.e. Francio).

Ĉar la varoj konsumataj en Francio devenas de multaj landoj, oni povas imagi, ke daktiloj de Tunizo kaj produktoj de Italio alvenas al Korsikio tra la kontinento(F), kvankam la rektaj transportoj estus pli malmultekostaj.

Notinde estas ankaŭ, ke en Sardinio estas agnoskata ne nur la sarda lingvo sed ankaŭ la kataluna en urbo "Algero" (kie la loĝantoj estas pranepoj de katalunoj alvenintaj ĉ. la 13-a jarcento), dum en Korsikio kiel en aliaj francaj etnaj regionoj nur la franca estas oficiala.

La samaj homoj, pri kiuj mi parolas ĉi tie, komence ĉiam riproĉas kiel stultaĵon, ke oni parolas pri koloniado, kiam temas pri francaj regionoj (en tiu kazo oni ne povas diri "kontinenta").

Sed kiel oni povas nomi tiujn historiajn faktojn :

- akirado de iu lando kontraŭ volo de la popolo ? (Ĉar Francio aĉetis al Genovo Korsikion, kiu estis jam suferanta kolonio - ĉar Korsikio stariĝis sendepende kaj nur milite Francio konkeris Korsikion).

- libera komerco malpermesita leĝe sed bedaŭrinde fakte, kiam la leĝo estas forigita, ktp. ?

**Jakelino :**

### **LERNU LA INTERNACIAN LINGVON !**

*Valo kaj aliaj sennaciistoj tre klare pentras al ni la evoluon de la homaro al unulingveco : iom post iom la etnaj lingvoj kadukiĝas kaj mortas (ekzemple la okcitana) fronte*

*al la regado de la naciaj (ekzemple la franca). La direkto de la evoluo estas tre neta. Ĝi kondukos en Eŭropo al flankenigo de la franca kaj de aliaj nacilingvoj fronte al la hegemonio de la usonangla.*

*Tial mi ne komprenas, kial manpleno da reakciuloj provas bremsi la progreson de la homaro al unulingveco aktivante por iu lingvo tute minoritata, sen perspektivo por la estonteco : Esperanto.*

*Vi, kiuj ĵuris reunuigi l'homaron, vi, kiuj ne eltenas la diversecon de la nacioj, estu koheraj kun vi mem! Lernu la ununuran kulturlingvon de la estonteco! Lernu la usonanglan!*

**Valo :**

### **DIFINOJ**

Kiu estas marksisto ? Ĉu tiu, kiu ripetadas la motojn de la Komunista Manifesto, la ekonomiajn kaj sociajn analizojn de La Kapitalo, la polemikajn frazojn de gazetartikoloj de Karl Marks ? aŭ tiu, kiu aplikas lian dialektikon al pristudo de nunaj okazoj kaj cirkonstancoj ?

Kiu estas Lantiano ? Ĉu tiu, kiu gurdas vortojn de kamarado Lanti, aŭ tiu, kiu rilatas al la nuna stato de la mondo kun la libera hereza menso, kiu karakterizis lin en lia tempo ?

Marks verkis antaŭ jarcento, Lanti verkis kaj parolis antaŭ duonjarcento. En tiu daŭro, kiom evoluis la vivkondiĉoj sur la tero! Konsekvence, kiel estus evoluintaj iliaj ideoj ?

Laŭ tiu koncepto, mi opinias, ke ofte Jakelino rezonas pli Lantie ol iuj ortodoksaj sennaciistoj. Generale mi ne konsentas pri ŝiaj vidpunktoj, kaj mi restas sennaciisto. Sed mi rigardas ŝiajn tezojn kiel priatentindaj, kaj indaj je senantaŭjuĝa pridiskutado.

### **"MODERNISMO"**

En nova cirkulero mi legas tiun novan eltrovon de la "moderna esperanto" : c = ts ĉ = ts zz = ts. Tri skriboj por unu esperanta sono, nia c. El kiuj, unu (ĉ) miaciel ne troviĝas en la klavaro de anglaj tajpiloj.

Mi rediras : kia simpleco! kia progreso!

Sed ĉu valoras pluigi komentojn pri tiu tordita inventaĵo ?

## PRI LA PAPILIOJ DE MEVA MARONO

\* (En **Laŭte!** n°78 SEPT.88, p.45a)

Surprizis min Meva Marono  
Ĉar ŝi verŝumas kun bontono.\*  
Pri papilioj ŝi primicas,  
en sia speco ŝi ja spicas!,

dum ŝi parolas pri Lineo,  
pri l'belaj tonoj de l'ideo,  
konceptas genre, ankaŭ spece,  
nuancojn regas dise-pece!

En ŝiaj versoj : papilioj!  
Flirtadas la aŝerontioj,  
angla belul' de Kamberŭelo,  
kaj citronul' en sia belo!

Falenoj nokte ĉe lilakoj,  
kaj la monarĥoj apud flakoj,  
vanesoj buntaj sur urtikoj,  
pjerisoj super la brasikoj.

Saten- kaj lun-heteroceroj  
flugantaj inter Ioniceroj,  
kaj silk-heterocer' : bombikso,  
el la kokon' : juvel-onikso!

Kaj maŝaonoj kaj licenoj  
inter manjoloj kaj falenoj,  
ruĝ-admiraloj kaj arktioj,  
kaj imperiestraj saturnioj!

Jen la amasa manifesto  
de l'papilia, brila festo,  
en la Marona grenokampo,  
kaj eble taŭga medal-stampo!

ERGOTO DE BONAERO



## laŭtaj informoj

### KAMPADEJA INFORMO

Karaj samideanoj,  
Okaze de nia vojaĝo tra Bulgario mi pripensis, ke bedaŭrinde oni ne trovas informojn ĉe la kampadejoj pri geesperantistoj loĝantaj en la urbo aŭ apude kaj kiuj estas pretaj renkontiĝi kun ni aŭ helpi al ni.  
En urbo Gabrovo ni renkontis, nur la morgaŭon, ĉe ekstera muzeo, viron kiu vidis nin enirantaj en la kampadejon kaj certe pro sia loko ne vidis nian flavan banderolon.

Informilo ĉe la akceptejoj ebligis al ni kontakti la lokajn geesperantistojn. Plie la vorto ESPERANTO estas bona propagando.

Mi proponas, ke ĉie oni metu afiŝon en la kampadejo por instigi la E-parolantojn kontakti la lokajn grupojn.

Amike, TEREZA.

### LIBROFESTIVALO EN NANTES

Ĝi okazis de la 3a ĝis la 5a de februaro 1989. La Esperanta Kultura Centro de NANTES ricevis de la Organizo budon por prezenti anglan literaturon esperante tradukitan kaj esperantan literaturon de anglaj verkistoj. Pro tio, ke la temo de la Festivalo estis brita literaturo.

25 000 homoj vizitis tiun festivalon kaj interesiĝis pri la budo pluraj dekoj, inter kiuj pluraj lasis sian adreson por ricevi pliajn informojn.

Dum la Festivalo, famkonataj geverkistoj :

\* Marjorie BOULTON, kiu verkis multe, interalie novan poemaron DU EL,

\* Claude PIRON, ankaŭ konata sub nomo Johano VALANO,

gvidis debaton, kies titolo estis "l'anglais s'abatardit, il faut le protéger" (angla lingvo bastardiĝas, necesas protekti ĝin). Ĉirkaŭ cent personoj ĉeestis interesan kaj vigan debaton.

Centre Culturel Nantes Espéranto

13, bd. de la Chauvinière, F 44300 NANTES

**ĈU VI RICEVIS...** fotokopion de diversaj informiloj pri la agado de Emile Vaissaire dum la lasta Eŭropa Kongreso de la Verduloj en Parizo ? Se ne, tuj skribu al :

Centre espérantiste Toulona Espero, Robert ROZE, 11 imp. Vieux Chemin de Sainte-Musse, F 83100 TOULON.

## Pri la 44a KONGRESO de SAT-AMIKARO

Ĉi-jare la SAT-Amikara kongreso estiĝis, sude de Francio, en la ĉarma urbeto PEZENAS, meze de departemento Hérault (26-27-28ajn de aprilo 1989). Ni tuj diru grandan kaj elkoran "dankon" al ĉiuj O.K.K.-anoj kiuj multe laboris, multe ŝvitis por havigi al ĉiuj partoprenantoj plejeble kontentigan restadon.

Kiel kutime ĉio disvolviĝis en amikeca etoso, des pli ke la urbaj kaj regionaj politikaj eminentuloj montriĝis tre favoraj al "nia" lingvo (ŝajne kelkaj iom konas ĝin aŭ almenaŭ provis kliniĝi super ĝi! - ja substrekinginda strebo, ĉu ne?) kaj samtempe brilis por ni bela suno en blua ĉielo.

Interesa kulturfilmo por prezenti al ni PEZENAS tra la jarcentoj, ĝi entenas multajn belajn kaj riĉajn memoraĵojn pri sia historia pasinteco (sen forgesi la restadon de "nia" famkonata Molière en ĝiaj muroj).

Simpatia honorvino en la urbodomo, kie la vicurbestro afable bonvenigis nin (pro la deviga foresto de la urbestro).

Vizito al la praurbo kun belegaj domoj, fasadoj, ŝtuparoj, kies arkitekturo estas vere rimarkinda.

Agrabla kaj ĝojplena vespero dank'al amatora trupo, kiu vigle prezentis al ni riĉan kaj plenan programon da folkloraj dancoj. Alia menciinda vespero, tute transprenita de nia juna kamarado Nicolas Freud, kiu virtuoze ludis multajn malfacilajn muzikaĵojn per sia gitaro. Sincerajn gratulojn al ĉiuj.

Kiel paroli pri la rimarkinda kultura vespero? Kiom riĉa kaj riĉiga ĝi estis! En religia silento, ni aŭskultis nian karan Roland Levreaud prelegi pri "(la) rolo de la virinoj en la franca revolucio de 1789". Li brile regas tiun temon, kiun li aparte amas kaj povas vigle pritrakti dum horoj kaj horoj.

La tutan vesperon li do promeniĝis nin tra la malhelaj revoluciaj eventoj, vekante ĉe la ĉeestantaro grandan interesecon per tiuj tro ignoritaj virinoj, kies kuraĝan kaj efikan influon oni ne povas preterlasi. Tro rapide pasis la tempo. La preleganto mem - bedaŭre - ekrimarkis, ke li nepre devas "fari finon". Viglaj kaj densaj aplaŭdoj spontane ŝprucis por gratuli la eminentan - ĉiam simplan kaj modestan - preleganton.

Komunaj manĝoj en grandaj salonoj (aŭ en Liceo aŭ en hoteloj laŭ la momentoj).

Bela ekskurso ĝis urbo Sète. Dumvoje ni vizitis la famajn prifosaĵojn kaj muzeon de Ensérune (ege instruaj, vere konsilindaj) en bela situo.

Kaj pri la Libro-Servo, kion diri? K-do Bernard Schneider prezentis

plenplenan ĉambron da diversspecaj verkoj kaj verketoj. Reliefiginde: "La danĝera lingvo" de la fama historiisto Ulrich Lins, absolute necesa libro por ĉiuj esperantistoj kaj precipe SAT-anoj.

Ni ne pretersilentu la lotumadon. Dank'al multaj malavaraĵoj donacintoj estis multe da feliĉuloj. Lote oni elektis la junulinon, kiu senpage ĉeestos la venontan internacian kongreson de SAT. (La gajnintino estas Françoise Dugas, lernantino de Léo Robert!).

Sed ne nur distraĵoj. Ni ankaŭ laboris, kompreneble! Tri laborkunsidoj (unufoje surbendigitaj) plus la kutimaj kunvenoj (pri TANEF, pri SAT, pri Liberecana Frakcio, pri Ekologio, kaj pri la deziroj kaj sinteno de la gejunuloj - kiuj sentas ŝanĝ- aŭ evoluad-bezonojn!).

Simone GALLARD

## Dek jarojn da ĉenleteroj por L!

Antaŭ 10 jarojn, okaze de E-Semajno en "Moulin de Beauville" (aŭguste 1979) naskiĝis la serio de ĉenleteroj, kiuj de tiam provizas regule la rubrikon "Nia debato" de **Laŭte!**

Jam 32 temoj estis pritraktitaj, kies listo sekvas. Ne multe modifiĝis la partoprenantaro. Preskaŭ ĉiuj "pioniroj" de 1979 restis fidelaj al tiu formulo de perkoresponda pridebatado de temoj: Jakelino, Suzanne, Nicole D., J.G., Janseb... Kaj ĵus revenis inter ni Patriko. La provo plivastigi la partoprenantaron ekster Francion restis limigita al 5 personoj (2 foriris). Domaĝe! Ni volonte "dungus" pli...

Eble ni ne sufiĉe tamburas por varbi genovulojn? Sed ja ĉiu intereso povas skribi al la red., ĉu ne?

### La temoj jam pritraktitaj:

- |                                 |                                       |
|---------------------------------|---------------------------------------|
| 1. Estonteco de Esp.            | 17. Baza Esperanto                    |
| 2. Armado                       | 18. Homoj kaj aŭtoj                   |
| 3. Strukturoj de la E-movado    | 19. Virinoj kaj armeoj                |
| 4. Mortpuno                     | 20. Fortranĉoj kaj sanktaj festenoj.  |
| 5. Ĉu bankrotis racio?          | 21. Proprumeco                        |
| 6. Ĉu mita proletaro revolucio? | 22. Transkurtena pacismo              |
| 7. Virina problemo              | 23. Povo de la amaskomunikiloj        |
| 8. Leĝpropono pri E en Francio  | 24. Mondsocialismo                    |
| 9. Maljuneco kaj Esp.           | 25. Terorismo: ĉu milito?             |
| 10. Memmortigo, eŭtanazio       | 26. Esperanto 100-jara: kaj poste?    |
| 11. Nacio                       | 27. La krizo: kiu elirejo?            |
| 12. Kiel vivantigi E-gazeton    | 28. Denunco kaj fidenunco             |
| 13. La modo                     | 29. Postmorta vivo                    |
| 14. Kiel aktivi por plu agiti   | 30. Komercaj aplikoj de Esp.          |
| 15. Soleco                      | 31. Rajto de malsimileco...           |
| 16. Laboro, rajto al pigro      | 32. Gastigado de esp-istoj (aperonta) |

## PRI CREYS-MALVILLE

Dekkvino da neregistaraj asocioj akredititaj ĉe U.N.O. en Ĝenevo adresis leteron al Sro Jan Martens, ĝenerala direktoro de U.N.O. en Ĝenevo. Ili petas lin rimarkigi al Sro Perez de Cueliar pri la situacio en Creys-Malville, ĉefe pri la fakto, ke aparte Ĝenevo ekproceduras ĉe la franca justico por kontraŭstarigi la reekfunkciadon de la centralo. Leterekzemplero estis sendita al la prezidento F. Mitterand.

## ĈERNOBIL : sanitara kontrolo

"Pravda" de la 11a de februaro 1989 anoncis pri Bjelorusio : la lastaj esploroj montris, ke la teritorio de tiu respubliko suferis damaĝojn pli ol antaŭvidite. Kvinono el la kulturaj bienoj estas pli-malpli infektitaj. 300 000 personoj ricevas sanitaran kontrolojn, kvankam la akcidento okazis en Ukrainio.

Pri la distancoj : se okazus eksplodo en Malville, 300 000 personoj subiĝus al sanitara kontrolo inter Dijon kaj Londres !  
(eltiraĵo en "Silence" n°117, monata ekologia gazeto, 4 rue Bodin, 69001 LYON. Tel. 78.39.55.33 ) esp-igis G.Gabillon

## ATESTO el Palestinano de Cisjordanio

Eltiraĵo el letero, kiun sendis al mi la familio de infano patronita de mi :  
"... la novaĵoj pri mia lando estas tre malgajaj. Ĉiutage murdo de Palestinoj, domdetruado, ĉie okazas sur la Teritorio.

Lastan semajnon en Qalqilya, kvar domoj estis detruitaj, kvar aliaj sigelfermitaj, ĉar junulo ŝetis ŝtonojn al la izraelaj soldatoj. Preskaŭ ĉiudutage okazas dormosignalo. Mi ne parolas pri humiligadoj kaj provokoj de la soldatoj. La lasta eltrovaĵo konsistas el konfisko de palestinaj veturiloj uzotaj por eniri en la vilaĝojn sen esti rekonitaj kaj aresti la homojn. Abdallah (la filo 10-jara) ne iras al la lernejo, la militistoj fermis ĝin por uzi ĝin kiel militbazon. Ni lernas hejme, por ke niaj infanoj ne estu analfabetaj..."

Mi ne bezonas komenti tion. Por esti solidara kaj helpi suferantajn, kurajajn popolojn, batalantajn por libereco, nur kelkaj vortoj sufiĉas.

G. Gabillon.

## "ATEISMO"

"Ateismo", organo de Ateista Tutmonda E-Organizo estas agrablaspekta bulteno, regule aperanta, kies starton mi jam menciis en L! La maja n-ro enhavas multajn interesajn artikolojn. Estas kontentige konstati iometan evoluon de la komenca rigideco al la nuna pli nuancita konsidero al la afero. Pri tio mi aparte rekomendas la artikolon "Kelkaj malfacilaĵoj" de Todd C. Moody, kaj tiun de O. Pavlov "Ni bezonas novan ateismon". Mi simple aldonas : ... ateismon vere liberpencan. Kribo

## KOREKTENDOJ

al

## "KIEL DIRI...?"

proponitaj de S-ano G. ODENT

Ĉapitro/\$ - Korektu (K) - Aldonu (A)

- 1/5. (K) Prave punita, laŭmerite.
- 1/7. (K) Balbuti pardonpeton.
- 2/7 (K) Sciigu al mi kiel la afero statas.
- 3/6 (K) Havi du ŝnurojn je sia arko.
- 4/2 (K) Grundo taŭga por vinberujo. Hektaroj da semotaŭga tero.
- 4/11 (K) Komasacio
- 5/3 (K) la 15-an de Decembro 1859 (1859.12.15 / 1917.04.17). Koran dankon pro via amika gratulo je...
- 5/9 (A) Granda aĝo. Li mortis grandaĝe.
- 6/5 (A) Rivero 200 kilometrojn longa.
- 6/16 (K) Aerujo
- 6/19 (K) Istmo.
- 7/7 (K) Okulumi al iu.
- 8/6 (K) Ne kun mi, sed ne kontraŭ mi.
- 8/8 (K) Veng*u* sin (pro io) kontraŭ iu.
- 10/4 (K) Prefere mi hakus lignon, ol...
- 10/10 (A) Kun foliar' daŭrema/fidela.
- 12/11 (A) Vertago (= melhundo). Mopseto.
- 12/12 (K) Estas pli facile por kamelo iri tra trueto de...
- 12/ABELO (K) Talio de vespo.
- 13/1 (K) Kato miaŭas./ Lupo hurlas/ululas.
- 14/12 (K) lasta lunkvarono ;
- 15/9 (K) La pratipo de metro kaj tiu de kilogramo...
- 15/13 (K) Mil metrojn super la nivelo de maro.
- 16/6 (K) Vekita de bruo.
- 17/9 (K) Tiu edzino estas vera perlo.
- 17/16 (K) Eksedziĝi je, disde iu. Proceso por eksedziĝo.
- 20/14 (K) Vi estas tre bona por mi.
- 25/18 (A) La noa ("n"-a) radiko de 10. Notoj : "n"-aria.
- 28/.. Talio de vespo. Oni konas lin kiel la blankan lupon.
- 29/4 (K) La kongreso komisiis al la komisiono...
- 29/7 (K) Protesti kontraŭ io per manoj kaj piedoj.
- 30/ 2a alineo (K) Senatente kunpuŝiĝi kun iu.

- 30/ 2)FRUNTO (A) Fruntalo (= fruntosto)  
 30/ 3)NAZO (K) Ne montri eĉ la pinton de la nazo.  
 30/ 4)LIPO (K) Inter pokalo kaj lipo povas okazi multo.  
 30/ 11)ŜULTRO (K) Akselo.  
 31/13 (K) Konformigi dieton al la temperamento de...  
 32/7 (K) Farigi al sia frato sian malfacilan laboron (eble per speciala ilo).  
 33/7 (A) Superi la rivalon per (je) du poentoj.  
 36/3 (K) Ni ja scias, ke da lingvoj ekzistas tre multe.  
 (A) (= ke lingvoj estas tre multaj).  
 36/10 (K) granda kvanto da aliaj lingvoj.  
 37/20 (A) kiu / nombras 3500 homojn.  
 37/25 (K) Magistrato.  
 38/5 (K) Tredi kolorajn bidojn.  
 39/2 (K) Plenmano da faruno... (A) Pinĉaĵo (preneto) da salo.  
 39/6 (K) Havi la vortaron preta sub la mano...  
 40/5 (K) Li ricevis pli ol sian porcion.  
 40/34 (A) Temanĝo.  
 41/3 (K) Mi konas vin tiel longan tempon, kiel povas...  
 42/32 (K) Inokuli en ies animon abomenon al la milito.  
 43/9 (K) Pacon al lia cindro.  
 45/5 (K) Kio estas via civila stato ?  
 48/7 (K) Eĉ aŭdi pri tio mi ne volas.  
 48/8 (K) Kiu aŭdis la unuan, aŭdu ankaŭ la duan.  
 51/2 (K) Piedfrapi iun sur la postaĵon.  
 51/3 (K) Li ne scias sur kiu piedo stari.  
 (A) Li staras, kiel se (kvazaŭ) li estus plantita.  
 51/6 (K) Dorso de la piedo (= instepo). La arkeco de la instepo.  
 52. 2a linio (K)  
 "Al dio plaĉu, sed sur la diablon ne kraĉu."  
 52/12 (K) Fari la signon de la kruco.  
 54/3 (K) (= priidi lian naivecon).  
 (K) Ne vidi kiel ridinda tio estas.  
 54/11 (K) Estas pli facile por ŝi plori ol por nubo pluvi.  
 55/8 (A) pasigi en via mezo (inter vi) unu semajnon.  
 57/12 (K) Figuranto (statisto).  
 59/24 (K) La ŝtata pravigo/neceso.  
 60/5 (K) Kio fariĝis, jam ne refariĝos.  
 59/6 (K) Mi konas lin tiel longan tempon, kiel povas...

- 62/1 (K) Trinki je ies sano.  
 63/2 (K) Vera kiel la sankta skribo...  
 63/8 (K) Jen unuafoje ŝi diris la veron.  
 63/15 (K) Ili certiĝis, ke...  
 65/4 (A) En (dum, je) bela dimanĉo/ Unu belan dimanĉon.  
 65/6 (A) Kion oni legas sur la termometro ?  
 66/4 (K) La batalo por la ekzistado.  
 67/5 (K) Kiu estas la marko de via aŭto ?  
 67/16 (K) La daŭro de valideco estas 2 monatoj.  
 67/17 (A) Urgiĝu (Rapidu)  
 67/22 (A) Pruvo, pobo (poupo).  
 67/23 (A) Rifo. Subrifo.  
 67/32 (A) Moleo./ Ĝeto  
 67/40 (K) Ŝvebi.

\*\*\*\*\*

P.18, linio 6 : ERATUMO  
 anstataŭ: (en miaj) kantoj al  
 legu : (en miaj) brakoj "La Ŝtona Gasto"

P.18, linio 21, forfalis tuta repliko, tiel ke parto de la dialogo iĝis nekomprenbla :

LEPORETO. Ĉu jam? Ha, vidvinoj, ha, virinoj! Ili ĉiuj samas!  
 DON JUAN. Ne, Leporeto, ŝi kun la aliaj ne samas. Ŝi estas vera anĝelo, kiun al mi sendis la ĉielo.

P.20, linio 13 : anst.: mi alparolos → alparolis  
 P.23, l.10 desube : anst. ja plej danĝera armilo lia → jen plej  
 La ĉi-suprajn replikojn vi povos eltondi kaj glui. La du aliajn tajperarojn vi bonvolu korekti mane. Dankas kaj pardonpetas la kulpulo, Kribo.

\*\*\*\*\*

Jus elĉerpiĝis ĉe SAT-Broŝurservo  
 (Forstreku el la listo, p.26 de L! 82)

Linguistique et non-violence  
 Les 16 règles commentées

Restas nur malmulte el : AR, KF, PT, VI. Abundas do la reeldonendaĵoj, dum bremsita estas ankaŭ la apero de novaĵoj. Pacienca la "klientoj" : necesas reordigi la presejon... kaj la presiston.

## AERPOŝTA SENDADO DE LAŬTE!

**Sugesto** : Al la legantoj de L! loĝantaj for de Eŭropo (Azio, Ameriko, Oceanio...) ni povus sendi la gazeton **aerpoŝte**, sed ĉi-okaze la postulata poŝta takso devigus **duobligi la abonprezon**. Kiuj pretas fari tian monoferon, informu nin pri tiu deziro.

Nu, por 1990 : normala jarabono 40 FF, aerpoŝte: 80FF.

## AMIKA ESPERANTO-RONDO AGENIA

oficiale okazigos sian "ĝeneralan" kunvenon dimanĉon 25an de junio, posttagmeze en la muelejo de Beauville, do post la finpreparado de tiu ĉi numero. La tagordo temas pri modifoj al la grup-statuto (por ke AERA <sup>ehlicu</sup> al ĉiu ajn verdstela terano - ni rastu large! - membriĝi kaj aktivi en ties kadro), elekto de novaj responsuloj, pridiskutado de la diversaj projektoj, ktp...


Estos krome agrabla okazo bonvenigi nian amikon Gastono FOURNIER, kiu ekde la 23a de junio estos nia surloka muelejano. Li decidis migri de Parizo al la kamparo por ĝui trankvilon, oksigenon kaj amikan ĉeeston en esp-a etoso. Li certe troviĝos kiel pioniro en renkontiĝejo, kie unuavide povas ŝoki la amaso da farendajoj. Sed rapide entuziasmo venas, ĉar ĉiu scias, ke eĉ se la taskaro estas grandega, ĝi tamen estas farebla per bonvolo kaj pacienco. Grava atuto estas, ke jam nun la "verda muelejo" povas "funkcii", eĉ se, komence, meze de ŝajna haoso.

Amikoj de **Laŭte!**, de la broŝurservo de SAT, de la muelejo, preparu vin subteni kaj partopreni en tiu nia entuziasmodona aventuro ! La tekston de la nova AERA-statuto vi trovos en **Laŭte!** kun aliĝilo.

**Donacoj por "Moulin de Beauville" (tria listo) :**

P.B. 130 - J.M. 300 - J.L. 500 - C.S. 1400 (Antaŭe : 11480, nun sume : 13810.) C.S. donacis krome motorsegilon "Black & Decker". Ni ĵus aĉetis 3 tendojn kvarpersonajn : 3150. Sumo de la elspezoj : 6336. Restas disponeblaj 7474 FF por instali la nepre necesan tualet-ejon. La tubisto estas (espereble!) tuj venonta. Ankaŭ la masonisto por la tegmenta fenestro, sed jam kiom da prokrasto...!

Kribo



De la 10a de julio ĝis la 3a de aŭgusto (ja "elastaj" limdatoj) :

RESTADO en  
"Moulin de Beauville"

Anoncis sin dudeko da plenkreskuloj plus kelkaj infanoj por tiu unua relative longdaŭra restado. Same

kiel la ĝenerala formulo, ankaŭ la periodo estas "elasta". Iuj personoj alvenos pli frue, aliaj foriros post la 3a de aŭgusto. Kelkaj restos nur 3 tagojn, aliaj plurajn semajnojn. Povos esti ankaŭ nur "preterpasantoj" ankoraŭ ne avertintaj pri sia vizito. Tamen, prefere anoncu vin, eĉ se nur telefone : Se ne respondas (53)95 40 26, la muelejo, provu (53)95 75 03, la laŭtejo en Laroque.

Ĉiu venos kun propraj personeco, emoj, kompetentoj, kaj ni kune interŝanĝos, simple travivante tiel la ĉiutagaĵojn (kunpreparado, kunmanĝado, kunlavado...) kiel ĉies proprajn iniciatojn. Tre elasta formulo, kiu komence surprizas pro la manko de strikta, kongressimila programo. Sed ĉio rapide "enordigas". Ĉu ne Elizeo Reclus iam diris, ke "anarkieco estas plej perfekta esprimo de ordo" ?

Longega estus listo de eblaj aktivecoj : (pelmele) priesp-aj ludoj, ekskursoj (piede, bicikle, aŭte), sinbanado, ĝardenado, kursoj (unua-grada, konversacia, perfektiga), kunverkado de artikoloj, debatoj, preparado de enkondukoj por ĉenleteroj, legado, masaĝoj, joko, do in, ordigo de biblioteko kaj gazetarkivoj, renkontoj kun lokaj ekologianoj, pacistoj, ktp... loĝebligado de la muelejo (plej impona taskego!) kun multaj diversaj fakoj (izolado de muroj, izolado de tegmento, tapetado, elektro-instalado, farbado, masonado...), botanika promonado (amiko Paŭlo gvidos nin tra la lokaj plantoj), kunkantado (NIKOLIN helpas !...), aŭskultado de muziko, lernado de redaktado, tajpado, ofsetado (ĉi-lasto nur por nerve stabilaj homoj), broŝurado, lernado de manĝoreceptoj (ni deziras kompili kajeron el receptoj de la vizitantoj), preparado de konservaĵoj (kompotoj, konfitaĵoj) por la venontaj renkontiĝoj, kolektado kaj segado de hejtligno, plantado de floroj... Ĉu sufiĉe ???

Nu, ĝis baldaŭ kaj... bonvenon!

Solanĝa, Kribo, Gastono.



## ARBO DE LA ESPERO

Sabaton la 22an de julio, en vilaĝo situanta 10 km-ojn sude de Angoulême, la Ĉarenta E-grupo plantos "arbo de la Espero" en ĉeesto de la vilaĝestro kaj de la hungaraj esperantistoj. Vi estas kore invitataj partopreni tiun simbol-plenan feston. Ties antaŭvidita programo :

Ekde la 10a h. : propagandkunveno.

11h30 : plantado de la Esperanto-arbo kun plako esperanta kaj franclingva.

12 h : honorvino. Komuna piknika tagmanĝo.

15 h. : informkunsido, diskuto kun du hungaraj samideanoj.

Detalajn informojn vi petu de : Isabelle Martinez,

53 rue du Minage, F 16000 ANGOULEME.

## ESPERANTO kaj ROK-MUZIKO

Ĉu vi konas Jacky ? Li havas multifacetajn talentojn. Inter aliaj, li estas filo de nia Kribo... kaj muzikisto-kantisto de regionskale fama rokgrupo "Norway". Bedaŭrinde, lin ankoraŭ ne kaptis la E-viruso de la patro sed... sed jen li nun pretas adapti rokmuzikojn por E-tekstoj! Koncertoj, registradoj, ĉu ne trafa diskonigo de E. inter la junularo ? Nu, de ĉiu inspirata versverkemulo Jacky atendas kanto-tekstojn. Skribi al la red. de L!

## PLIAJ ELDONPROJEKTOJ ĈE SAT-BROŝURSERVO

Kvankam en la nuna periodo SAT-Broŝurservo dormetas pro superŝutateco de sia kutima prizorganto, jenaj projektoj aldoniĝas al jam longa listo :

**Por tutmonda civitismo - La necesa civitana edukado**

(Andrée Gaymard-Rollet, trad. D. Durand)

**Kancero kaj Ekologio - Vido al estonteco** (Maurice Touchais, trad. Valo) Pri la termika poluado...

**36 Paŝetoj al plua posedo** (unua legolibro, adaptita de L. Lentaigne, laŭ ideo de Cl. Cayzac)

Pacienca tiom la manuskriptosendintoj kiom la fidelaj broŝurabonantoj : iom post iom la broŝurservo espereble kontentigos ĉiujn. Sed nun gravas ĉefe, ke **Laŭte!** konservu sian regulecon malgraŭ la diversaj perturboj. Ĉi-rilate la ĉi-jara kolekto estos rekorda kun ĉ. 400 paĝoj en 6 n-roj!

=====

Nia sibilaĵo : Alsvarmas papilioj kaj libeloj. La simio regrimpas en sian arbon.